8-a JARO, N-o 368/369 LEIPZIG, 22. / 10. 1931



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio) | APERAS SEMAJNE

AL LA TUTA SAT-ANARO!

Jam ĉe la Amsterdama Kongreso la Administracio konigis per sia jara raporto pri la danĝera financa situacio, en kiun falis nia organizo, pro la terura bato, kiun inside efektivigis kontraŭ ĝin la CK de SEU, rabante al SAT grandegan monsumon. La breĉo, kiun faris la nericevo de tiu ĉi sumego (preskaŭ 90 000 frankoj!) en nia buĝeto, k kiu laŭ la intenco de la rabintoj devus plene bankrotigi nian Asocion, efektive signifas gravan malhelpon en nia agado, k ĝi kondukos al paralizo k eble eĉ al bankroto, se ĝi ne estos ŝtopita, se ni ne sukcesos baldaŭ pagi la ŝuldojn.

Gek-doj! Fakte la tiel kreita financa situacio estas tre serioza k eĉ minaca; tiom pli, ke ĝi estas pligravigita per la tutmonda ekonomia krizo.

– Kial do vi ne jam konigis pli frue la situacion k ne faris jam necesajn elpaŝojn por savi nian komunan entreprenon? kredeble demandos multaj K-doj.

– Ĉar kelkaj P.K.anoj konservis la fortan esperon, ke sukcesos la klopodoj de „Neudrag“ por ricevi grandan parton el nia mono en rubloj senpere de CK de SEU en Moskvo, k nur en aŭgusto oni informis nin pri la malsukceso. Ni plie deziris ekkoni la rezulton de la referendumo por ekscii, ĉu ni posedas la necesan aŭtoritaton por fari gravajn decidojn. En ĉi tiuj apartaj cirkonstancoj – en ĉi tiu tempo, kiam la interna krizo en nia Asocio metis speciale gravan respondecon sur la ŝultrojn de la gvidantoj de l'organizo, ni ja bone konsciis, ke estus nesufiĉa la simpla aprobo de kongresa plimulto, por rajtigi nin plue gvidadi la Asocion. Laŭ nia propra propono, k speciale laŭ instigo de K-do Lanti, la Amsterdama Kongreso konsentis, ke ni organizu ĝeneralan voĉdonadon inter la SAT-anaro pri la demando de fido aŭ malfido al la nuna gvidantaro de l' organizo. Per tiu plej demokrata maniero ni volis ekkoni la volon de l' membraro, scii, ĉu ni havus la nepre bezonatan aŭtoritaton por plue gvidi la SAT-ŝipeton tra danĝeraj rifoj en maltrankvila maro.

Ni aranĝis tiun referendumon senprokraste post la Kongreso. Kaj nun ĝi estas por la plej grava parto (la eŭropa) jam finita. Ties rezulto, kiu estas malmulte plu influebla per la voĉdonantoj en ekstereŭropaj horzonoj, estas nekontestebla *esprimo pri fido* de la granda plimulto el la voĉdoninta membraro al nia gvidado.[1]

*

Tiu fid-esprimo de granda plimulto el la aktivaj membroj rajtigas nin nun fari la neeviteblajn k necesajn decidojn por savi SAT-on el bankroto k resanigi la financan staton de l'Asocio, k konduki ĝin – ni havas nenian dubon pri tio – al nova prosperado ... kun via helpo, kun *ĉies* helpo, Gek-doj!

Unu el la plej efikaj rimedoj por iom senbalastigi la buĝeton, estas la malpli ofta aperigo de *Sennaciulo*, ĝia dusemajnigo por provizora tempo. Kiel vi povis vidi, jam la lasta n-o estis duobla, same kiel ĉi tiu, k ankaŭ sekvontaj n-oj aperos kiel duoblaj en dusemajna interspaco...

Ni faris la decidon aperigi dum kelka „S-ulo“n *dusemajne* kun la plena konscio, ke unuparte ni per tiu elpaŝo povos grave helpi al la ekvilibrigo de l'buĝeto, k ke, aliparte, ĝi ne povas k ne devas havi la signifon de malantaŭeniro: Kiel la saltulo faras paŝon malantaŭen por povi tiom pli bone eksalti antaŭen k supren, tiel la kelktempa dusemajnigo de „S-ulo“ signifas tempo (antaŭvideble ĝis la jarfino) la streĉon de ĉiuj niaj fortoj, la preparigon al nova ekiro antaŭen, supren, por la efektivigo de niaj taskoj sur refirmiĝinta financa bazo!

Tia estas la signifo de la nuna dusemajna aperigo de „S-ulo“, k ni volas ĉi tie elstarigi unu fakton, kiu malpravigas tiujn, kiuj opinius, ke per nia decido ni malprofitigas la abonpagintojn, liverante malpli grandan kvanton da legaĵo: Fakte tiel ne estas, ĉar ĉiu membro-abonanto, kiu pagis sian aktivmembran kotizon komplete ĝis jarfino, k ĉiu alia, kiu abonis „S-ulo“n dum la jaro 1931, *ricevos en la lasta kvaronjaro de 1931*[2], en kiu „S-ulo“ aperas dusemajne, kontraŭ nura pago de l'sendkostoj (egalvaloro de internacia respondkupono) *la „Protokolaron pri la XI-a SAT-Kongreso en Amsterdamo“, tre ampleksa broŝuro, eble 100 paĝoj da dense presita teksto,* kies aperigo en „S-ulo“ estus okupinta plurajn kompletajn numerojn. Sekve *la kompenso* al la abonantoj pro la provizora dusemajnigo de „S-ulo“ *estos pli ol egaliga.* Pasivaj membroj ricevos ankaŭ tiun broŝuron, se ili per antaŭpago de l'sendkostoj esprimas la deziron ĝin ricevi.

Sed kiel tia kompenso povas okazi? Tiel ke la preskostoj por la „Protokolaro pri la XI-a Kongreso“ estos pagataj per la salda profito de l'Kongreso. Kaj ke tiu aktuala broŝuro estas leginda k legenda por ĉiu membro de SAT, pri tio ĉiu konsentos.

Alia decido nia estas ĉesigi la aperigon de *„La Nova Epoko“*. Ties abonantoj ricevos kompense „S-ulo“n k ankaŭ 1 ekzempleron de la „Protokolaro“. Pri la estonta sorto de nia Revuo la legantoj trovas kun tiu ĉi numero apartan alvokon, kiun ni varmege re-

[1] La ekzaktajn nombrojn ni ne jam konas k ilin publikigos nur, kiam la plena rezulto estos konata k la balotiloj kontrolitaj de la por tio en Lajpcig oficantaj K-doj.

[2] Precizan daton pri la finpreso de la *Protokolaro* ni ankoraŭ ne povas indiki; sed kredeble estos en novembro.

komendas al ilia atento. Pri tiu iniciativo de K-do Lanti, subtenata de kelkaj aliaj K-doj, estas tamen necese sciigi, ke finance SAT alprenas nenian respondecon, ĝis la buĝeto de la Revuo estos ekvilibreca. La literaturamantoj devas pruvi, ke ili kapablas vivigi mem sian organon.

La dusemajnigo de „S-ulo", la ĉeso en la aperado de „L.N.E." ebligis alian ŝparon: Ni maldungis *provizore* la libroteniston, K-don Platiel, k ni pagas al la aliaj dungitoj por nur 3- aŭ 4-taga laboro semajne. Vi vidas, ke niaj dungitoj pretas alporti oferojn por la Asocio, por kiel eble plej rapide likvidi la krizon. Ni ne dubu, ke ili estos entuziasme subtenataj de la cetera membraro. Ĉi-okaze ni rimarkigu, ke neniu el la Direkcianoj ricevas salajron, kvankam kelkaj el ili elspezas plurajn horojn ĉiutage k eĉ tutajn tagojn por la Asocio.

Ni faris tiujn elpaŝojn, por ke ni povu likvidi la ŝuldojn k ĉefe por aperigi la *Jarlibron* kiel eble plej baldaŭ. Ni projektas presigi ĝin en februaro 1932. Tiucele la K-doj faru viglan varbadon ĝis fino de januaro, por ke la nomoj de la varbitoj povu ankaŭ aperi en tiu ĉi Jarlibro. Pripensu ankaŭ, ke estas preferinde pagi sian aliĝon ne en la lasta momento, precipe ankaŭ pro tio ke la Administranto ne nur devas zorgi pri la registrado de l'membreco, sed ankaŭ pri la aranĝo de la Jarlibro *samtempe.* Ĉar la manuskripto devas esti liverata sufiĉe frue al la presisto (la kompostado de adresaro estas sufiĉe malsimpla laboro!), ni ne povas garantii, ke enestos la nomoj k adresoj de tiuj nov-aliĝontoj, kiuj pagos nur post la 20-a de januaro. La perantoj k aktivuloj atentu do pro tio k profitu ĉiun okazon por instigi varbitojn plenumi sian aliĝon sufiĉe frutempe! Espereble ni estos en februaro pli financfortaj ol nun.

*

Vi do vidas, Gek-doj, ke ni penadas supervenki plej baldaŭ la financan krizon k faras nian parton por renormaligi la disvolviĝon de la Asocio k de ĝiaj organoj; k ni estas firme konvinkitaj, ke ni sukcesos en niaj klopodoj, ke SAT vivos k disvolviĝos malgraŭ la malnoblaj atencoj, kiujn ĝi elportis lastatempe.

Sed por ke tiu procezo de resanigo okazu kiom eble plej rapide k certe, ni hodiaŭ alvokas al via subteno. Ni malfermis monkolekton, k vi vidis la unuajn rezultojn el tiu kolekto publikigitaj jam en la antaŭa numero.

Ni ne dubas, ke nia insista alvoko, en tiu ĉi grava situacio, estos aŭdata de ĉiuj. Cirkuligu listojn por monkolektado, en ĉiuj grupoj k rondoj, eĉ ĉe neesperantistoj. Profitu ĉiun okazon!

La K-doj, kiuj havas laboron k estas iom pli bonŝancaj ol aliaj, ne nur partoprenu la monkolektadon, sed tuj repagu sian kotizon por 1932. Kaj se kelkiuj povas pruntedoni sumon, ĉu grandan, ĉu malgrandan, ili rapidu tion fari. Ili povas fidi al ni. Ni ne estas el la speco de rabintoj el la CK de SEU. SAT pagas siajn ŝuldojn. Ni estas certaj, ke la SAT-anoj, malgraŭ la malfacila nuna ekonomia situacio, pro kiu suferas la plej multaj, estos pretaj porti oferon al sia organizo, por ĝian plueniradon certigi k doni trafan respondon al la detruantoj k sabotantoj.

Al la laboro! K-doj! La kolektitan monon sendu al Lajpcigo aŭ Parizo.

Por ŝtopi la breĉon en la buĝeto de SAT

2. listo:

Greta de Jonge, G. Vugteveen, Teunissen, J. Leeuw (13412), J. Pieperiet (1940), Ge-SAT-anoj 670 k 5877, ĉiuj en Enschede, kune 7,5 g.; K-do Rival, St. Etienne, 10 fr.fr.; K-do Lanti, Paris, 20 fr.

Ĉiujn sumojn ni kvitancos per „S-ulo" Ne forgesu, ke ĉiu, eĉ la plej eta donaco, helpos refortigi k firmigi la organizan aparaton. Espriminte vian fidon al nia gvidado, vi esprimis, ke SAT devas resti tia, kia ĝi estis ĝis nun. Donante materian helpon, vi substrekos vian voĉdonan esprimon k ebligos — tute simple dirite — *pluigi SAT-on;* ĝia vivkapablo estas ligita kun oferoj de lojaluloj; ne la komercaj principoj povas ja esti ĉe la bazo de nia entrepreno, kiu servas al ideala celo. Helpu do ĉiu siaparte k laŭ sia povo!

La rezulto de nia komuna agado devas esti k *estos:* ŝtopado de l'breĉo en nia buĝeto, por ke SAT post mallonga tempo povu rekomenci sian iradon antaŭen kun la celo meti esperanton je la servo de l'*tuta* klasbatala laborista movado.

Tiel ni povus fini nian alvokon. Ni opinias tamen necese aldoni apartan vorton al niaj komunistaj K-doj. Ni scias, ke multaj ne aprobas la detruan agadon, kiun faris iliaj sampartianoj. Tiuj malaprobantoj ĝenerale silentas, tial ke ili estas disciplinitaj partianoj k timas esti denuncataj kiel „oportunistoj". Al ili kiel al ĉiuj aliaj ni diru, ke SAT restas kiel antaŭe lojala al la komunista tendenco kiel al la aliaj. Malkaŝe aŭ anonime ili do povas daŭrigi sian kunlaboradon al „S-ulo" k ili trovos niaflanke saman akceptemon kiel antaŭe. Niaj kritikoj al la raba politiko de CK de SEU neniel signifas malaprobon al la komunismo k precipe al Sovetio, kie la granda plimulto ankaŭ aprobas nian agadon. Tion ni ja scias per la multaj leteroj ricevitaj. Ni havas la firman konvinkon, ke ni defendas pli bone la Oktobran Revolucion ol tiuj, kiuj lakee servas ĝin. Niaj Sovetiaj amikoj havu paciencon: ne povas esti, ke la karieristoj el SEU eterne estos ĉiopovaj en la lando, kie oni konstruas socialismon.

Unuvorte SAT pluvivas; ĝia bazo k spirito restas tia, kia ĝi estas depost ĝia stariĝo. Nia parolo ne konsistas el vortoj, sed fundamentas sur faktoj, sur agoj. Por labori al la esperantistigo de ĉiuj klaskonsciaj laboristaj rondoj senescepte, certigu la vivon de SAT! Ni ĉiuj faru nian devon!

LA PLENUM-KOMITATO DE SAT.

LASTHORE.

Per ĉiaj rimedoj!

Nia fruntpaĝa artikolo estis jam verkita, kiam nin trafis precizaj informoj pri la ĉejuĝeja elpaŝo de la presejo „Neudrag" kontraŭ nia Administracio en Lajpcig. Ĉi tiu „laborista" entrepreno, ĉe kiu ni depost longaj jaroj presigis nian gazeton k multajn el niaj aliaj eldonaĵoj (antaŭe ĝi nomiĝis „Peuvag", antaŭe „UNS"), k al kiu ni regule k akurate pagis dum tiu longa periodo niajn fakturojn, eluzas niajn momentajn financajn malfacilojn por

procesi kontraŭ SAT ĉe la burĝa juĝejo

k tiel trude pagigi al si *per unu fojo* la ŝuldatan sumon de 3 643. 59 mk. germ.!

Oni notu bone, ke „Neudrag" *ne konsentis* atendi, kvankam ĝi tre bone scias, ke niaj malfaciloj rezultas el la nericevo de la mono ŝuldata de CK de SEU! Ĉi tiu presfirmo, kiu havas filion en Moskvo, klopodis ja rekte el nia Moskva konto pagigi al si la ŝuldatan monon (laŭ nia konsento) k eĉ sukcesis en fino de oktobro 1930 ricevi el Moskvo 1000 mk. germ. Poste ĝi, laŭŝajne, plue klopodadis, k ĉiam, kiam nia Administranto persone, aŭ la Direkcio skribe informiĝis pri la stato de la afero, ĝi esperigis nin plue k klarigis la prokraston en la afero, ĉu per forpermeso de sia administranto, aŭ de sia komisiito en Moskvo ktp. Kaj eĉ, kiam ni estis jam decidontaj pri transdono de la presado al pli malkare laboranta presejo, ni ricevis (je la 23. aprilo 1931) rapidpoŝtan leteron, kun promeso pri baldaŭa solvo de l'monafero per rekta pago en Moskvo mem al la tiea filio de „Neudrag". Ĉu la presejo serioze kredis al la sukceso en tiu momento aŭ ĉu estis nur manovro por gardi la klienton k ĝin konduki en la nunan situacion? Kio estas certa, tio estas, ke „Neudrag" ĉiam plue esperigis nin, k nur je la 8. aŭgusto 1931 anoncis pri la malsukceso de siaj klopodoj! . . .

Hodiaŭ ĝi procesas ĉe la burĝa tribunalo! Oni povas sin demandi, ĉu „Neudrag" ne agas interkonsente kun

la opoziciaj instancoj por per juĝproceso en okazo de nepago konfiskigi nian havaĵon por la profito de tiu opozicio, kiu per sia agitaĉo ne sukcesis trafi tiun rezulton? Ni starigas la demandon k lasas al la K-doj la zorgon respondi.

SAT per tiu atenco al sia materia bazo estas en ekstreme danĝera situacio; *tuj* estas bezonata granda sumo da mono por likvidi la ŝuldon k tiel embrie mortigi la firimedajn klopodojn. Gek-doj! Ni insistege alvokas vin aranĝi tujajn monkolektojn por SAT, k ni speciale petas tiujn K-dojn, kiuj povus al ni prunte havigi iom da mono, ne prokrasti tion fari. La pruntitajn sumojn ni repagos kun rento.

Direkcio de SAT.

La bazo de l'kapitalismo ŝanceliĝas; tial, konfidante vian ŝparitaĵon al banko, vi riskas tute perdi ĝin. Prefere pruntedonu vian monon al SAT, ĉe kiu estas pli da garantio ol en kapitalistaj bankoj.

El Suda Afriko.



K-do I. Dajmond (Diamond)

Antaŭ kelka tempo estis enkondukata k jam funkcias leĝo en Sudafriko, pro kies esenca karaktero diktatoreca rajto estas donata al la justecministro. Laŭvole tiu ĉi administranto de burĝa leĝaro povas malpermesi al iu ajn individuo, ke li vizitu aŭ parolu ĉe kunveno; ankaŭ enkarcerigi aŭ ellandigi tiun, kiu kontraŭas la leĝon. Tiel lastatempe en diversaj partoj de la lando, preskaŭ nekonata de la blankularo ĉi tie, multaj indiĝenaj antaŭenemuloj k gvidantoj de indiĝenaj organizoj estis persekutataj k forsendataj al la provincoj de sia deveno. Evidente la pasportleĝoj, per kiuj la indiĝenaro estas ligata, ne sufiĉe efikas por sufoki ilian pli k pli progresantan konsciiĝon k vekiĝon. Sed kompreneble la menciita leĝo ne nur aplikiĝas al la negra loĝantaro. Ankaŭ la blankuloj (t.e. la laborista sekcio) estas trafataj de ĝiaj efikoj, kiuj fakte signifas la forrabon al la Sudafrika laboristaro, ĉu blanka ĉu nigra, de la rajto de libera parolo k kunveno.

Al la legantoj jam estas konata, ke kelkaj eŭropanoj estis arestataj dum la unuamaja manifestacio en Johanesburg, inter ili la gvidanto de la lokaj senlaboruloj, K-do Dajmond (Diamond), kiu estas ankaŭ kompartiano („S-ulo" n-o 349). Kontraŭ K-do Dajmond ankoraŭ estis akuzo pro parolado, kiun li faris la 21-an de marto ĉe publika kunveno de la senlaboruloj. La 4. septembro finiĝis la proceso kontraŭ K-do Dajmond k tri aliaj senlaboruloj. Unu akuzito estis liberigata. Pri du aliaj la juĝisto, donante sian decidon, diris, ke „reale ili estas du ordinaraj krimuloj" k „kvankam la atestoj montris, ke la okazoj dum la aludita tago havis ordinaran karakteron, li ne povas trakti ilin, pro iliaj *antaŭaj krimoj*, aliel ol severe", k kondamnis ĉiun je dekok monatoj da punlaboro. Post la kutima moralumado k elverŝo de krokodilaj larmoj la juĝisto diris: „Sed vi, Dajmond, mi vere bedaŭras, ke mi devas vin puni... Mi estus traktinta vin malsevere... Mi ja ne konsideras la okazintaĵojn dum la unua de majo kiel gravan aferon... Sed aliel mi devas konsideri la incidenton dum la 21-a de marto. Oni pruvis vin kulpa pro la esprimo de jenaj vortoj:

„Mi estas tre malkontenta, ke nur 15–20 el la senlaboruloj ĉeestis la kunvenon, kio signifis, ke neniaj invadoj[1] povis esti farataj tiun tagon. Se oni intencis fari invadojn, oni devas ĉeesti kiel kelkmilopa anaro, ĉar se la polico enmiksiĝus, al forto devus esti kontraŭstarata per forto, simile al la senlaboruloj en Keptaŭno (Capetown), kiam policano devis esti sendata al hospitalo. Mi volas, ke vi komprenu, ke vi ne devas cedi antaŭ la policanaro. Se unu el la senlaboruloj estas mortigata, 5 aŭ 10 policanoj devas morti. Ni devas renversi la registaron k la urbestraron. La Komunista Partio nin helpos. — Tiujn ĉi vortojn la juĝantaro trovis pruvitaj. En lando kiel nia, kie troviĝas superrega negra loĝantaro, laŭ mia imago nenio pli verŝajne kondukus al serioza maltrankvilo k danĝero, ol blankulo, kiu parolas al miksita amaso el blankaj k negraj personoj, uzante tiajn vortojn kiaj estas pruvitaj laŭ la akuzo. ..."

K-do Dajmond estis kondamnata je dekdu monatoj da punlaboro.

En la vortoj de la juĝisto oni trovas esprimita la ĉefpunkton de la tuta afero. La sola krimo de K-do Dajmond estas, ke li aŭdacis organizi k gvidi blankajn k negrajn laboristojn unuigitajn. Kiel esprimis unu K-do ĉe amasprotestkunveno: Per la afero de nia K-do Dajmond la blanka mastraro en Sudafriko avertas, ke „neniu tuŝu miajn sklavojn".

Ja la serioza krizo, en kiu troviĝas ankaŭ tiu ĉi lando, elvokas maltrankvilon k neordinaran agemon ĉe tiu sekcio de la loĝantaro pleje trafita de ĝi, k responde ankaŭ kontraŭrimedojn de la potenculoj. Per la atakoj direktitaj de la registaro kontraŭ malfortigita laborista movado, Sudafriko eniras la vicojn de la terorlandoj. La tutmonda Proletaro notu tion bone k helpu per protestoj k kiom ajn eble siajn fratojn en la malproksima posteno de la klasbatalkampo. *Materiero (3958).*

[1] „Invadoj", t.e. manifestacioj antaŭ la plej riĉaj kluboj, hoteloj k restoracioj.

Por relative tre modera sumo
vi povas akiri libron de daŭra valoro:

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

La unika lingva konsultilo por ĉiu esperantisto!

536 paĝoj. Form. 14×20 cm. Prezo: bindita 10 mk. g., broŝ. 9 mk. (afrankite).

SAT 23, rue Boyer, Paris XX, aŭ Colmstraße 1, Leipzig O 27.

EL JAPANIO.

Projekto de giganta manifestacio en Tokio okaze de l'1. aŭgusto malsukcesis.

Estis decidite, ke en la ruĝa tago frue matene kolektiĝu, por organizi gigantan manifestacion, la proletaro el tuta Tokio antaŭ la korto de l'urbotrama vagontenejo. Sed respondecaj K-doj subite antaŭtage ŝanĝis la planon sub pretekstoj, ke la renkontejo estas danĝera dank' al tro severa policgardo k ke granda amaso da senlaboruloj ne povas kolektiĝi en la difinita horo.

Tiel en la tago proksimume 100 laboristoj alvenintaj la renkontejon estis dispelitaj aŭ arestitaj; tiel la manifestacio plene malsukcesis. Sekve ankaŭ senlaborula kongreso projektita ne povis okazi.

Heroaj manifestacioj por la 1. aŭgusto en Jamanaŝi.

Malgraŭ la furioza antaŭpersekuto estis algluitaj tie ĉi k tie tra la tuta gubernio agitfolioj de niaj batalemaj laboristoj k kamparanoj, harditaj jam per sinsekvaj bataloj. En la tago matene la laboristoj en la vojkonstruejo apud la urbo Kofu ekstrikis, forlasis sian postenon k manifestacie marŝis en la straton. Dume kamparanaj manifestaciantoj moviĝis al la urbo, ĝis fine ambaŭ partoj kunfluis en nombro de 300 personoj. La manifestacio baldaŭ dividiĝis en du taĉmentojn, kies unu marŝis al la bienuldomo en farmkonflikto, k la alia al ŝpinfabriko, kiu havis strikon lastatempe. Survoje la unua renkontis embuskon de policanoj; okazis tumulto, nur kelkaj estis arestataj post granda luktado; la marŝantoj instigis survoje 120 vojkonstruantojn al striko, englutis ankaŭ ilin en siaj vicoj. Apenaŭ la dua taĉmento sin montris proksime de l'fabriko, kiam la laboristinoj ĉe la maŝinoj kun ĝojkrioj elkuris al la manifestaciantoj. Ĉe la tumulto sekvanta la policestro ricevis gravan vundon, kiam li provis aresti sindikatajn gvidantojn. La tuta estraro

de l'Kamparana Sindikato estis arestata. La K-dinoj, kiuj partoprenis la manifestacion, estis preskaŭ senescepte vundataj. Oni postulis de ili protokoli, ke ili akcidente vundis sin mem. Malobeemuloj estos akuzataj!

Publika juĝado al komunistoj.

Rezulte de pli ol trifoja persekuto al Japana Kom.Partio en 1928—29 k 1930, nun pli ol du mil komunistoj suferas malliberon en diversaj lokoj de la lando. Kaj la unua publika juĝado al la partia kerno komenciĝis la 25-an de junio k daŭris ĝis 31. julio (ĉi-jare). Post somera ripozo ĝi remalfermiĝis la 5-an de sept. La grava signifo de tiu juĝado kuŝas en jenaj punktoj: 1) Oni batalakiris konferencon de l' akuzitoj en la malliberejo; 2) oni akiris unuecigon k publikigon de l'juĝado, kontraŭbatalante al la dividita, malluma juĝado, la okulfrapa intenco de l'reganta klaso dividi la juĝadon laŭ la sidejoj de l'pundomoj, en kiuj estas tenitaj la akuzitoj, k kaŝi la juĝadon al la publiko; 3) oni batalis decide en la korto kun postulo al senprokrasta liberigo de l'klasaj politikaj „krimuloj".

Striko de Koreaj ŝtonetkolektistoj.

600 Koreaj fratoj, ŝtonetkolektistoj ĉe la rivero Tamagaŭa apud Tokio, kunsidis la 20-an de julio por konsiliĝi pri jenaj postuloj: 1) ke la laboristoj havu la rajton por ŝtonetkolektado; 2) oni forigu la maŝinŝipon; 3) oni altigu la prezon de l'ŝtonetoj je 60 %. La kunsidantoj estis subite atakataj de policanoj sub preteksto, ke la kunsido estas neleĝa. Al ĉi tio la kunvenintoj respondis per manifestacio. Inter la senarmilaj proletoj k la policistoj kun nudaj glavoj en la mano okazis batalo dum du horoj. Unu K-do ricevis vundon 10 cm-profundan k 120 K-doj estis arestitaj.

La terspacon, lasitan ĝis nun al la Koreaj fratoj por libera kolektado de l'ŝtonetoj, transdonis la Interna ministerio al avida kapitalista sindikato, k tiel estis malpermesita per polica povo la libera kolektado al la laboristoj. La sindikato siaflanke sufokis la K-dojn per duonpreza vendado de l'ŝtonetoj akiritaj per la maŝinŝipoj. La lab.postuloj estas nepraj por ilia vivo. Spite polica subpremo ili do batalas por ili.

Japanaj laboristoj sendis 8 proprajn delegitojn al la Korea laborej-kunsido k tiel montris sian solidaron kiel japanoj kun la batalo de l'Koreaj laboristoj.

Laŭ „Proleta Esperantisto" (Tokio), n-o 7.

Per SAT en Skandinavio.

Skandinavio estas multrilate unika lando. Ne nur pro siaj rokmontaroj k noktomeza suno en Laponio, ne nur pro sia belega arkipelago k fjordaro, sed ankaŭ pro sia unika laborista movado.

Kiel oni scias, Svedio jam depost la jaro 1814 ne partoprenis ian militon k tial dum la tuta tempo la kulturo k ekonomio povis senhalte k sen malantaŭeniro evolui. Tion oni tuj rimarkas jam ĉe la Stokholmaj laboristoj. Iliajn loĝejojn ni povas nomi luksaj kompare kun tiuj de estonaj laboristoj. Ĉiuj loĝejoj havas modernajn gaskuirejojn k se ne estas por ĉiu loĝejo aparta banĉambro, tiam almenaŭ ĉiu familio havas rajton en la difinita tago de l'semajno uzi la banĉambron. Tolaĵpurigon helpas elektro; same oni jam purigas la plankojn, gladas la vestojn ktp. nur per elektro. Ne estas plu multaj laboristaj loĝejoj sen telefono! Tamen tiaj loĝejoj ne estas malmultekostaj — ili forprenas ĉ. 25 % de la salajro de l'laboristo.

La esperanto-movado estas forta en Svedio, sed ne plej forta en la ĉefurbo mem. En multaj provincaj urboj la influo de l'esperantismo estas treege sentebla. En Stokholmo la plej granda esp.societo estas — la Stokholma Laborista Esperanto-Klubo. La neŭtrala klubo ekz. eĉ ne aranĝas dum someroj siajn semajnajn kunvenojn, dum la Lab. Esp-Klubo ankaŭ somere estas vizitata de ĝis 100 Gek-doj ĉiuvendrede. En sia konsisto la klubo estas treege diversa — estas socialistoj, komunistoj, anarkistoj k ĉiuj kunlaboras en sia esp. klubo plej amike. La sufiĉe altaj salajroj (kompare kun aliaj landoj) de svedaj laboristoj ebligas al multaj Gekdoj viziti aliajn landojn, k dum la klubkunvenoj la Gek-doj rakontas pri siaj vojaĝoj. Ankaŭ la klubo estas tre ofte vizitata de eksterlandaj Gek-doj. Oni devas konstati nepre la fakton, ke ordinare la svedaj esp-istoj pli ŝatas paroli ankaŭ en siaj kluboj svedan lingvon anstataŭ esp-o, sed en ĉi tiu oni ne povas tion konstati. Ankaŭ oni tre multe kantas en la Klubo esp-ajn laboristajn kantojn dum ĉiu klubvespero.

Ofte ŝajnis al mi, kvazaŭ ne estas dece kanti multsignifajn, revoluciemajn kantojn en *tiu ĉi* klubo. Kial? En la klubo oni ne sentas revoluciemon en la paroladoj k en la klubprogramo, kiel oni povas tion senti en la alilandaj laboristaj kluboj. Nome — la cirkonstancoj en Svedio k la rilatoj inter diversaj klasoj estas pli mildaj, multe pli mildaj ol en aliaj landoj. La laboristaro ne sentas tre grandan batalemon k tial la laboristaj kantoj tie ĉi kvazaŭ ne havus sin veran valoron. Pli multe konvenas al la klubo varia k amuza programo, kian ĝi ankaŭ havas.

Krome ekzistas forta esp-klubo en la antaŭurbo Sundbiberg, Tramista Esp-Klubo k anarkista klubo. Precipe inter la tramistoj esp-o estas bone disvastigita k la esp-aj tramistoj ankaŭ estas granda helpo por eksterlandaj vizitantoj. Inter la Stokholma tramistaro estas ĉ. 300 esp-istoj. Por ili aranĝas kursojn la tramdirekcio, kiu jam vidis, ke dum esp-aj kursoj oni ricevas multe pli grandajn rezultojn ol en la kursoj por naciaj lingvoj. Esp-istaj tramistoj de Stokholmo ofte ricevas ankaŭ somere stipendiojn de la tramdirekcio por viziti per esp-o eksterlandajn grandurbojn k konatiĝi kun la aranĝoj de tieaj tram-instaloj.

La Stokholmaj laboristaj gazetoj favore rilatas al esp-o. La socialdemokrataj aperigis esp-ajn kursojn k multajn priesp-ajn artikolojn, la sindikatista gazeto ĉiutaga „Arbetaren" havas konstantan esp-lingvan angulon, multaj fakaj gazetoj same.

Nun iom pri mia vojaĝo mem. Per elektra vagonaro mi veturis el Stokholmo al la sveda komerca k ĉemara centro Gotenburgo. La urbo mem estas tre interesa pro sia lokiĝo inter rokoj. Oni vidas, kiel la homoj penas forigi la rokojn, konstruante en ilin vojojn k dompartojn, sed ankoraŭ restas sufiĉe multe da nuda roko, kiu povas nur servi kiel la altaĵoj por rigardi la belon de la urbo k de l'ĝin ĉirkaŭanta maro. Ankaŭ tie ĉi jam estas konstruitaj multaj modern-stilaj domoj kun modernaj k komfortaj loĝejoj. La laboristkvartalanoj en Svedio dum somero ŝatas loĝi en t. n. „kolonioj". Ili konsistas el dometoj, ekstere de la urbo, kiuj estas treege malgrandaj; en ili la laboristoj loĝas nur somere. Ĉirkaŭ ĉiu dometo estas frukt- k legomĝardeno. En Stokholmo dum somero loĝas ĉ. 65 000 laboristoj en tiaj „kolonioj". Belege ili aspektas. En grandaj valoj ili troviĝas, verdaĵoj kun ruĝaj, flavaj k verdaj dometoj. Sur iliaj stratoj (jes, ili havas ankaŭ stratojn) kuras la infanoj, la knabinoj — portantaj knabajn pantalonojn, sed tamen ne precize knabajn. La pantalonoj de l'knabinoj estas multkoloraj, ruĝaj, flavaj, verdaj, bluaj k longaj. Ne nur la malgrandaj knabinetoj portas ilin, sed ankaŭ plenkreskintoj. Kiel praktikaj estas tiaj vestoj (kompreneble ili portas ankaŭ konforman, samkoloran k samstilan bluzon) dum biciklado, motorboatveturoj k ankaŭ en la ĉiutaga vivo!

Vintre la laboristoj loĝas en la urboj k tiam viglas en la studrondoj la laboro. La sveda laboristaro ja havas fortan *Laboristan Klerigan Asocion,*

KVARONJARE

vi povos ekde 1932 pagi vian kotizon al SAT! La tarifoj restas neŝanĝitaj. Sed pro la financa krizo nuna pli dezirata estas *tutjara* k *tuja* pago de l'kotizo fare de tiuj, kiuj ĝin povas efektivigi.

Ne prokrastu!

kiu gvidas la tutan kleriglaboron inter la sveda laboristaro k kiu helpas al la starigo de ĉiaj studrondoj. Membroj de tiu ĉi Asocio (svede plimallongigite: ABF) povas esti ĉiaj laboristaj societoj — politikaj k fakaj. Sekve de tio, ĉar precipe en Svedio la fakaj unuiĝoj estas ekonomie fortegaj, ABF posedas sufiĉan monon por sia kleriga agado. Mi donu nur tiun ekzemplon, ke en Gotenburgo ABF havas 40 000 membrojn. La metalista fakorganizo pagas jare ĉ. 25 000 kr. da membrokotizo! Aliaj fakorganizoj memkompreneble pagas ankaŭ laŭ la grando de sia membrokvanto. De la urbo ricevis ABF da subvencio en pasinta jaro — 5000 kr., ĉi-jare — 7000 kr. k por venonta jaro ĝi postulos 10 000 kr.

En la studrondoj lernas la laboristoj po 20—30 p., ordinare en esp-aj studrondoj pli grandnombre, ĉar esp-on instruas en Svedio grandparte eksterlandaj instruistoj, kial ankaŭ la intereso pri esp-o estas pli granda. Dum lastaj jaroj la nombro de esp-aj studrondoj en ABF superis 250 ĉiujare!

En Gotenburgo dum la pasinta jaro estis tre vigla esp-a movado pro la kursoj de l'estona instruistino E. Pen (Pähn). Tamen, oni diras, ke la laborista gazetaro, ĝenerale, ne rilatas sufiĉe favore al esperanto.

Trolhetan (Trollhättan) estas turista centro, sed ankaŭ k precipe industria urbeto kun ĉ. 15 000 loĝ., kie mi ankaŭ haltis, kvankam tie estas neniu SAT-K-do. Mi antaŭsciigis pri mia vizito al la esp-isto, kies adreson mi trovis en la Jubilea adreslisto de Sveda Esp.Federacio. Renkontis al mi en la stacio pluraj esp-istoj. Preskaŭ la unua demando, kiun ili faris al mi, estis tiu de reprezentanto de UEA: „Ĉu vi estas UEA-ano?“ Mi kompreneble neis k certigis mian SAT-membrecon. Poste evidentiĝis, ke tiuj esp-istoj, same kiel la reprezentanto de UEA, estas simplaj laboristoj, kiuj lernis esp-on eĉ per ABF, la Lab.Kleriga Asocio (interalie — laŭ *Lingvafon*-gramofon-diskoj), k ili mem estas ankaŭ membroj en la lokaj lab.unuiĝoj, sed kiel esp-istoj ili estas organizitaj „neŭtrale“. Tiun fakton mi povis konstati ne nur en Trolhetan, sed ankaŭ multe alie en Svedio. Eĉ gvidantaj personoj de diversaj lab. organizoj, same socialistoj kiel komunistoj, apartenas al „neŭtralaj“ esp.societoj aŭ estas eĉ reprezentantoj de UEA. Ofte niaj „neŭtral-esp-iste“ organizitaj K-doj asertas, ke la esp-a devas esti neŭtrala movado, ke ili bezonas ankoraŭ plivastigi la lingvoscion inter *ĉiaj* homoj k tial ili ne rajtas montri, ke esp-o estas *nur* laborista afero. Sed, karaj svedaj K-doj, tio tamen ne malhelpas al vi esti organizitaj ankaŭ en laboristaj esp.unuiĝoj! Kaj — certe en Svedio esp-o jam estas sufiĉe disvastigita, por ke esp-istaj agantoj en la lab. movado povu jam ekfari *per*esp-an laboron, sed ne nur poresp-an! Tiuj ĉi linioj pri la troa „neŭtraleco“ de svedaj lab.esp-istoj ne estas diritaj *nur* pri Trolhetan. En Tr., kompare kun la forto de l'esp.movado en aliaj urboj, la nuna stato estus eĉ pardonebla.

Sed por Sveda Laborista Esp.Asocio, kiu ja nun transiris en la manojn de novaj gvidantoj, estas ankoraŭ granda laboro — klarigi la taskojn de nia movado k elŝiri la esp-ajn K-dojn el ilia „neŭtralemo“. Mi ne dubas, ke la situacio pliboniĝos jam en plej proksima estonto.

(Finota.) *N. Ruus (15428) el Estonio.*

Pri la kvinjara plano

AL LA SOCIALISMO AŬ AL LA FARAONISMO?

(Fino. Vd. n-ojn 364/367.)

La historio montris al ni imperiojn, en kiuj nenio estis lasita al la hazardo, en kiuj la tuta produktado efektiviĝis laŭ planoj rigore starigitaj, en kiuj la individua propraĵo ne ekzistis, la ŝtato aŭ ĝia reprezentanto estis la nura posedanto. Tiuj imperioj havis civilizon ekstreme brilan, tre ampleksan por la epoko; la restoj de iliaj monumentoj ankoraŭ mirigas, eĉ iom timigas nin. Sed, kiu kuraĝus pretendi, se ne juraj profesoroj, ke tiuj civilizoj estis socialistaj? Ili, male, estis la tipo plej perfektigita de la ekspluatado k de la subpremo.

El tiu formo de socio, la faraona reĝimo de la antikva Egiptujo estas la plej malnova konata ekzemplo; la Imperio de la Inkas, kiun la konkerantoj-militestroj de la deksesa jarcento trovis ankoraŭ en plena funkciado sur la altaj peruaj plataĵoj, estas la plej lastdata.[1]

En ambaŭ okazoj, unu politika fako ... pardonu! unu monarko kun sia konsilantaro, apogata de tuta ideologia aparato (pastroj en Egiptujo, *amaŭtoj* en Peruo) administris la tutan ekonomion de la lando laŭ difinita plano k pere de grandega skrib- k ali-oficista burokrataro. Tiuj imperioj konstruis la piramidojn k admirindajn templojn; ili fosis kanalojn k konstruis vojojn pluraj centojn da kilometroj longajn, dank' al scienca organizado, kiu lasis al la laboristo nur la ĝustan neceson por vivteni sin k sian familion.

Ĉu tio estas socialismo?

Kaj tamen, ne estis en tiuj socioj la plej eta signo pri kapitalismo.

Kaj tamen, la produktado, sub tiu reĝimo faris rimarkindajn progresojn.

Sed, tute kiel en la kapitalisma socio, la progresoj de la produktado ne profitigis la produktantojn. Kaj tio: ĉar ekzistis ŝtato. De la produktantoj distinga ŝtato. Ekzistis polico, armeo, tuta aparato por subpremo, kiu estis distinga de la popolo. Do, neeviteble, la plusvaloro iris al tiuj, kiuj disponis pri tiu forto, kiuj disponis pri la ŝtato. La ĉeesto de ŝtato, de armita forto, distinga de la popolo, estas la pruvilo mem, ke ekzistas ekspluatado.

La estonto.

Konsekvence, ĉar la proletara diktaturo ne ekzistas en Rusio, ĉu oni povas diri, ke U.S.S.R. iras al la socialismo?

Ĉio dependos de tio, laŭ kia maniero evoluos la ŝtato. Se la nuntempa rusa ŝtato cedos la lokon al la diktaturo de la proletaro, se la G.P.U. estos senigita je siaj politikaj funkcioj, se la ruĝan armeon anstataŭos la tutproletara armiĝo, se ĉiu oficisto fariĝos efektive, konstante anstataŭebla k ofte submetita al la reelekto, sammaniere kiel sindikata sekretario, se neniu oficisto ricevos salajron superan al tiu de laboristo, tiam, sed nur tiam, la industria disvolviĝo de Rusio k la industriigo de la terkulturo signifos la iradon al la socialismo; aliel, ĝi signifos nur la iradon al iu sistemo de burokrata ekspluatado.

Marks k Lenin insistis pri tiu punkto, ke, se la anstataŭigo de la ŝtato per la proletara diktaturo estas necesega por la irado al la socialismo, tiu anstataŭigo estas efektivigebla pro jena kialo: se la privilegiitaj klasoj, por firmigi sian regadon, ĉiam bezonis fortan aparaton, de ili mem distingan, estas pro tio ke ili reprezentis nur malplimulton rilate al la granda amaso de la laboristoj, kiujn ili devis teni sub la jugo, sed la proletaro, kiu, male, reprezentas la grandan plimulton rilate al la eks-privilegiitaj klasoj, povas certigi super ĉi tiuj sian regadon, ĝis ili estos

[1] Oni devus eble aldoni ĉi tie, kiel pli lastdatan kazon, la organizadon de Paragvajo, dum la 17-a k 18-a jarcentoj, sub la regado de la jezuitoj.

Tre leginda poemaro
de revoluciema K-do estas la belega
POEMO DE L'PLUGISTO
originala esp. versaro de ĤRIMA.
„Biblioteko de Sennaciulo“. 64 pĝ.
Form. 11×14. Prezo: 0,60 mk. g.
Administracio de SAT,
Leipzig O. 27, Kolmstr. 1

komplete detruitaj, ne bezonante alvoki alian forton ol sian propran.

Ĉar la rusa proletaro tute ne estis la plimulto, sed nur malgranda malplimulto kontraŭ la nenombrebla klaso de l'kamparanoj, posedantoj aŭ plejparte aspirant-posedantoj, eble pro tio Rusio estis kondukata al tio starigi ŝtaton de la proletaro distingitan. Sed ĉi tiu kialo estas malaperanta. La kolektivigo de la grundo proletigas la kamparanon. Post kelkaj jaroj, la kamparanaro, kiel persona posedanto, estos preskaŭ tute malaperinta. Tiam, la proletaro, ĉu urba, ĉu kampara estos efektive iĝinta la grandega plimulto. Ĉiu preteksto por la konservado de la ŝtato estos do malaperinta.

Tiu momento estos decida en la historio de la Revolucio.

Se, en tiu momento, kompleta politika revolucio ne okazos, se la diktaturo de la proletaro ne instaliĝos, se la hodiaŭa ŝtato, burokrata, polica, militista, povos ankoraŭ plue etendi siajn radikojn, la irado al la socialismo estos definitive haltigita. Anstataŭ la irado al la socialismo estos la irado al la faraonismo. Al la maksimuma ekspluatado al la homaj fortoj por la nura gloro de la faraono, per kiu ajn moderna nomo ĝi vestaĉas sin, k por la nura ĝuo de liaj helpantoj k fanatikuloj.

Miaflanke mi ne malesperas.

Depost dekkvar jaroj, la vivo de la rusa popolo estis senĉesa miraklo. Eĉ ne atentante la mirigan manieron, per kiu ĝi supervenkis la grandegajn malhelpojn de la civila milito, la restarigo, kiun ĝi efektivigis antaŭ tri jaroj por eliri el la novkapitalismo, en kiu ĝi estis enkotiĝanta, permesas ĉiujn esperojn.

Certe, oni ne vidas disvolviĝi nuntempe, por la starigo de la diktaturo de l'proletaro, movadon kompareblan al tiu, kiu malhelpis la revenon al la kapitalismo. Ankaŭ la movado, kiu leviĝis en tiu senco, antaŭ kelkaj jaroj, sub la agitvorto pri restarigo de la laborista demokratio, ŝajnas esti nuntempe multe perdinta da sia forto, pro la fakto mem de l'sukcesoj akiritaj en la tereno de l'detruo al la novkapitalismo. Tiu detruo estus cetere multe faciligata, se okazus en aliaj landoj krom Rusio proletaj revolucioj, kiuj tuj dekomence stariĝas sur la kampo de l'proletara diktaturo, revolucioj, kiuj tuj „rompas" la ŝtaton k donas definitive la povon al la popolo, rekte k senpere.

Tia restariĝo estas ebla, sed oni ne povas diri, ke ĝi estas certa.

Se ĝi ne okazos, do la rusa proletaro estos nur ŝanĝinta sian mastron.

Ŝanĝi mastron, estas afero, ve! kiun la franca proletaro bone konas; ĝi estis la unua, kiu faris pri tio grandiozan eksperimenton. Kiam, antaŭ unu jarcento, la Malnova Reĝimo estis renversita, la franca popolo sin kredis libera; ĝi kredis esti liberiginta sin de ĉiu ekspluatiĝo; ĝi nur ŝanĝis la formon de sia ekspluatiĝo; ĝi nur forpelis la nobelon por meti burĝon je lia loko.

La solvo, kiu estos donata de USSR. al la demando pri la ŝtato, en la venontaj jaroj, difinos, ĉu la rusa revolucio estos la lasta el la revolucioj faritaj de la popolo, sed ne por la popolo, aŭ la unua el la revolucioj faritaj de la popolo k por ĝi. Ĝi decidos ĉu, jes aŭ ne, ĉi tiu revolucio estos la unua socialista revolucio. *R. Luzon.*

Tradukita de la Alĝera Esperantista Grupo el la franca revuo „La Révolution Prolétarienne" (La Proleta Revolucio).

Publikigonte la ĉi-supran artikolon, laŭ insista peto de la Alĝera Esperantista Grupo, ni antaŭvidis, ke kelkaj legantoj ne konsentos kun la tezo de Luzon. Tial ni opinias necese rediri, ke laŭstatute ĉiuj tendencoj havas en SAT la rajton defendi sian vidpunkton en serioza k konvena maniero. Estas do evidente, ke ni bonakceptos artikolojn, kiuj rebatos aŭ klarigos kelkajn punktojn el la pritraktita temo.


Ni rimarkigas tamen, ke la aŭtoro de la ĉi-supra artikolo montras evidentan simpation al la Sovetia proletaro. Povas do nur temi pri la plej trafaj rimedoj uzotaj por sukcesigi la socialismon en Sovetio mem k en la tuta mondo. Nur tia materialo povas aperi en nia gazeto k ne malicaj polemikaĵoj, kies bonefiko estas ĉiam tre dubinda.
E. L.

MENDOJN pri libroj ĉiuspecaj, esperantaĵoj, leterpapero, insignoj ktp. faru ekskluzive ĉe la
ADMINISTREJO DE SAT,
Kolmstrasse 1 Leipzig O 27.

Oni preparas la spiritojn.

Temas pri la ĝusta dispartigo de l'kolbaso!

„Tiel ĉiu ricevas ion!



Se oni volas okupi plejeble multajn laboristojn, oni devas dispartigi ĝuste la sumon de l'salajroj, kiuj estas disponeblaj en la tuta ekonomio.

La salajroj povas esti plialtigotaj nur, se altiĝos la tuta profito k per tio ankaŭ la tuta sumo de l'salajroj. Aliel altiĝo de l'salajroj signifas senlaborecon. Tiel estis la afero dum la lastaj jaroj";—nun sekvas bildeto kun la jarciferoj 1928-30. Sur tiu bildeto la kolbasaj partoj estas pli grandaj, sed tri laboristoj estas forpuŝataj de la tablo; ili diras: „Tion kaŭzas la plilarĝigado, nun ni sidas flanke.

Do, kion fari?"

La sekvanta bildeto kun la jarcifero 193? havas la subskribon: Ni do kunŝovu nin iomete, tiam la tri aliaj havos denove lokon. — La partoj de la kolbaso estas malpligrandigitaj, la tri senlaboraj prenas ree lokon ĉe la tablo.

Tiuj tuj kompreneblaj bildetoj estas simile prezentataj en propaganda broŝuro de l'entreprenistaj asocioj germanaj. Tiu broŝuro havas la titolon „Kial senlaboreco?"; per instruaj statistikaj figuroj, bildoj k versaĵoj ĝi pruvas, de kie devenas la senlaboreco. De kie? Nu, la supra bildo donas la esencon: ekzistas nur difinita sumo por la salajroj; do, plialtigo de l'salajroj kaŭzas plialtigon de l'prezoj; nun, la homoj ne povas aĉeti sufiĉe; oni devas maldungi laboristojn; „nun ni sidas flanke!" Kiel forigi senlaborecon? Tre simple: malaltigi la salajrojn! Jen la simpla solvo de l'problemo por la entreprenistoj. — Prudente ili ne montras la alian (ne malgrandan) pinton de l' kolbaso, la profiton. Ja, je la fino de l'broŝuro ili akcentas la neceson, kolekti kapitalon. Por kio ili bezonas tion? Por persona lukso: Mi citas la konatan ekzemplon de l'gefratoj *Lahuzen:* tiuj aĉetis k ŝanĝkonstruis grandan kastelon, ĉiu havis plurajn aŭtomobilojn, lastan jaron ili aĉetis ankoraŭ kelkajn bienojn por ĉasado; nun iliaj kreditintoj perdis pli ol 200 milionojn da mk.g. Plie: la grand-industriisto *Simens*, homo, kiu amas paroli pri la neceso por la germana popolo plisimpligi sian vivtenon, en jaro 1930 konstruigis por si propran muzikhalon, kiu kostis 50 000 mk.g. — Tiu kapitalo estas bezonata por ofte sensenca k vana pligrandigo de l'produktejoj: La kompanio „Maksimilianshute" konstruis en Untervelenborn (Turingio) novan ferproduktejon; ne longe post finkonstruado ĝi ĉesigis la produktadon en tiuj establaĵoj. La cement-industrio uzis siajn profitojn por elaĉeti novajn pli malmultekostajn produktantojn; la plej alta grado de ĝia okupado estis 50 ĝis 60 elcentoj; tamen ĝi elspezis proks. 300 milionojn da mk.g. por novaj produktejoj. La kompanio por artefarita silko „Glancŝtof" konstruis novan fabrikon en Zigen; finkonstruita tiu fabriko nun staras sen maŝinoj, ne uzata (milito necesas, por ke ĝi povu esti uzata). La „Altfornegejo Lubek" pligrandigis siajn produktejojn je la duoblo; nun ili estas pretaj por produkti; intertempe la okupado malplialtiĝis je 40 elcentoj de l'estinta kapablo; ktp.

Sed tiu broŝuro ne havas teorian celon. Ĝi estu k jam estas disdonata al la laboristoj. Ĝi estas facile komprenebla k klare ĉiu ekvidas la nepran neceson malplialtigi la salajrojn. Tiel oni preparas la kampon por siaj intencoj. Ĉar malplialtigo de l'salajroj necesas, por ke la mastroj povu repagi la eksterlandajn kreditojn en venonta februaro. Dume la mizero estas granda. La salajroj apenaŭ sufiĉas por vivi. Do, oni devas atendi akran reziston. Tial, oni preparu la cerbojn, alvoku solidaron; tiam oni pli facile sukcesos. Tio valoras ankaŭ elspezon de 0.15 mk.g. por ekzemplero.

Atentu, laboristoj! *Vetig (16900).*

Atencoj kontraŭ la kapitalismo.

Mia laŭtparolilo aŭdigas: „Halo, radio Budapeŝt. Gesinjoroj, mi dissendas la funebrajn solenojn okaze de entombigo de la viktimoj de l'fervoja akcidento. Trans la limojn de Hungario, la tuta civilizita mondo sentas indignon pri la abomena krimo de komunistoj, kiuj kun besta kruelo murdis senkulpulojn, virinojn, infanojn, maljunulojn sendiference. Ĉiutempe en la historio popoloj ribelis kontraŭ siaj regantoj, sed atenco kontraŭ internacia vagonaro estas monstra aĉaĵo kontraŭ la homaro, estas diktita de nura instinkto je detruo. Pripensu, ke en tia vagonaro troviĝas la plej diversaj homoj, riĉuloj k malriĉuloj, oficistoj, direktoroj, mastrinoj, kiuj, sidantaj sur ledotegitaj aŭ lignaj benkoj, veturas renkonte al negoco, plezuro, laboro. Kaj la sorton de tiuj homoj trafis la infera maŝino, ĵeteginta la vagonaron en abismon de 26 metroj. La efiko estis terurega. Neniu el la pasaĝeroj k personaro restis nevundita. La nombro de la mortintoj estas 22, inter ili 4 angloj k 2 belgoj. En la hospitaloj kuŝas ankoraŭ 5 grave vunditaj. La loko estas firuze elektita. Proksima estas la ĉeĥoslovakia limo k la banditoj verŝajne disponis pri aŭtomobilo por rifuĝi ĝustatempe. Tamen la polico febre klopodas, kapti la krimulojn, se ili ankoraŭ troviĝas en la hungaria regno. Ke temas pri agado de komunistoj, estas evidente pro tio, ke jam depost kelka tempo okazis tiaj atencoj kontraŭ vagonaroj, unue en Rumanio k Jugoslavio, poste en Aŭstrio k en Germanio dum reveno de la ministroj Bruning (Brüning) k Kurcius (Curtius) el Londono. Nun la lasta krimo en Hungario, en Bia-Torbadj. ... Sendube tiuj atencoj estas faritaj laŭ ia plano, kiu devenas el Moskvo. Estas atencoj kontraŭ nia kulturo, kontraŭ nia socio. Sed ni jam interrilatis kun aliaj ŝtatoj por malebligi pluajn tiajn krimojn, por liberigi la relvojon de la socio en la estonton ..."

Tiel parolis la oficisto de l'radiostacio Budapeŝt. Sekvis funebra muziko k ĥoro de l'fervojista kantunuiĝo. Mi meditis. Ĝis hodiaŭ oni ne kaptis la atencintojn. Oni ne scias, ĉu vere estis komunistoj. Oni nur supozas tion. Oni nomas ilin murdistoj. Kaj mi memoras, ke ĉiutage en la grandurboj miloj da senlaboruloj vagadas, sen hejmo, sen nutraĵo, sen mono. Daŭre atencas la kapitalismo kontraŭ ilia sano, ilia vivo. Kelkaj jen sinmortigas, jen svenas surstrate pro malsato, jen frostmortas sub ponto, en loĝaĉkavo. *Ilin murdas la alia flanko!* Ĉu oni pri tio furiozas k dissendas venĝokriojn per radio? Ankaŭ tiuj homoj estas senkulpuloj. Sed oni silentas k neniu protestas kontraŭ la mortigo al tutaj familioj pere de la mizero. Oni per pafiloj traktas manifestaciantojn por laboro k pano, precipe en Hungario.

Tial mi diras, ke en lando, kie ne ekzistas ia politika libero, la potenculoj *tute ne rajtas* plendi pri abomenindo de tiuj atencoj. Donu al la popolo sociajn rajtojn k ĝi ne bezonos servigi al si senesperajn farojn por laŭtigi sian voĉon! *Magjaro.*

Jubileo de komunista gvidanto.



La 4-an de oktobro la sekretario de Komunista Internacio, K-do Kuusinen, festis sian 50-an naskiĝo-tagon. Tiuokaze mi volas skribi iomete por „S-ulo" pri la vivo k agado de Kuusinen. Jam depost sia junaĝo li okupis sin pri la problemoj de l' socialismo k rapide evoluis al la marksismo. De antaŭ la revolucio de 1905 li aliĝis al la finlanda socialdemokratio. La revolucio de 1905 trovis Kuusinen en la vicoj de l'batalantaj laboristoj. Li havis vere revolucian sintenon. Dum la malsupreniro de l'movado, kiu sekvis la revolucion, li gardis neŝanceleblan fidelon al la laborista klaso. Li estis elektita en 1908 kiel membro de l'Centra Komitato de la Partio k reelektata seninterrompe ĝis 1918. Unu jaron antaŭe li fariĝis politika redaktoro ĉe la centra organo de l'finlanda partio. Kuusinen estis elektata en la parlamenton de Finlando k reprezentis sian partion ĉe la diversaj kongresoj de l'II-a Internacio k precipe ĉe la Kongreso en Bazel, en 1912.

En la finlanda partio Kuusinen kontraŭbatalis vigle la revizismon en la praktiko kiel en la teorio. La revolucio de 1917 trovis lin ĉe lia posteno, k kiam la finlanda proletaro en 1918 transprenis la povon, li partoprenis en la revolucia registaro. Pro gravaj mankoj k eraroj de tiu revolucia registaro ĝi estis sange subpremata; post la malvenko Kuusinen senkompate kritikis tiujn mankojn k tiel definitive akceptis la vidpunkton de l'revolucia marksismo. Lenin mem plene konsentis la tezojn pri organizado, kiujn redaktis okaze de la 3-a Kominterna kongreso Kuusinen. Depost tiu tempo en ĉiuj kunsidoj de l'Centra Komitato de Komintern li partoprenis aktive. Liaj artikoloj aperis en la „Komunista Internacio", en la „Internacia Korespondaĵaro" k en ĉiuj kompartiaj gazetoj tra la mondo; en ili li pritraktis ĉiujn demandojn pri revolucia batalo de l'tutmonda proletaro, la batalon kontraŭ la blanka teroro ktp.

Tamen tiuj artikoloj, paroladoj, tezoj ktp. reprezentas nur malgrandan parton el lia politika laboro. Kiel membro de l'C.K. de la finlanda kompartio li kunlaboras ĉe la direktado de tiu sekcio de Komintern, kiu troviĝas en ekstreme danĝera posteno. Sed la plej gravan rolon Kuusinen ludas kiel sekretario de Komunista Internacio; li partoprenas kiel tia dum jaro centojn da kunsidoj de l'sekretariejo de K. I.

Per ĉiuj siaj laboroj Kuusinen fariĝis la fidela amiko, kunlaboranto k direktanto de l'batalanta internacia proletaro k de l'subpremataj amasoj en la koloniaj landoj. Tial mi opiniis inde prezenti tiun batalanton al la legantaro de „S-ulo". *Finlanda komunisto.*

La klasbatalo tra la mondo

El Britio.

Preskaŭ ĉiutage okazas nun manifestacioj de senlaboruloj tra la lando. La 30-an de septembro pluraj miloj da senlaboruloj post kunveno en Hajdparko apud Londono marŝis al la parlamentejo por manifestacii kontraŭ la malpliigo de l'senlaborula subteno. La amaso kantis ĉirkaŭ la parlamentejo revoluciajn kantojn atendante la revenon de delegitaro sendita al la parlamento por submeti al ĝi dokumenton kun 200 mil protest-subskriboj. La manifestaciantoj sukcesis en iu momento rompi la polickordonon.

En Glasgovo (Skotlando) manifestaciis la 1. oktobro 50 mil personoj; ili kontraŭbatalis la policistojn per boteloj, ferstangoj, hakiloj ktp k elrabis plurajn magazenojn. La laborist-partiano Mak Govern estis arestata k enkarcerigata pro „incito al tumulto". Mult-

aj policanoj k manifestaciantoj estis vundataj. La manifestacioj daŭris ĝis la nokto k ripetiĝis la sekvantan tagon.

El Kanado.

En Estevan (Saskaĉevan) okazis la 29-an de septembro grava batalo inter policanoj k 600 strikantaj ministoj, kiuj manifestaciis tra la stratoj kun ruĝaj standardoj. Ĉe tiu batalo estis mortigataj du ministoj k dudeko vundata. Rezervtrupoj da policanoj estis urĝe alkondukataj per speciala vagonaro por sufoki la ribelon. La estraro timigita urĝis la solvon de l'prisalajra konflikto ĉe la ministaro.

El Polio.

La pola faŝismo provis asimili la kondiĉojn de l'politikaj enkarcerigitoj al tiuj de ordinaraj krimuloj. La politikaj malliberuloj akceptis la batalon k deklaris la ĝeneralan malsat-strikon. 10 mil laboristoj en poliaj malliberejoj malsatstrikis dum pluraj tagoj k estas pretaj rekomenci ĉiutage. Ili estas rekte minacataj per fizika ekstermado. Batado k torturo estas ordinaraj rimedoj en tiuj malliberejoj.

El Argentino.

Uriburi, la buĉisto de Argentino, mortigas k turmentas ankoraŭ ĉiam. Oni traktas nin pli malbone ol sovaĝajn bestojn; la politikaj malliberuloj estas vipobatataj. Oni metas al ili kaskojn sur la kapon, kiuj interne estas provizitaj per najloj, kiuj penetras en la kranion. 155 K-doj estas ekzilitaj al Uŝuaija en Suda Argentino, inter ili 4 virinoj; alia granda nombro estas sur la insulo Marton Garcia. Argentino nun estas granda malliberejo; ĉiu nia laboro ĉe sindikatoj, bibliotekoj, ĵurnaloj estas malebligita. Iuj arestitoj malaperas sen postsigno. La dekstra mano de Uriburi, la polica majoro Rosasko falis per la venĝanta mano de kelkaj el niaj K-doj.

Laŭ gazetservo de A. J. I.

Ĉe la hindaj fervojistoj.

La batalo de l'hinda fervojistaro kontraŭ la maldungado atingis novan staton. La registaro ne konsentis la dezirojn de la Tuthindia Fervojista Federacio rilate la iom-post-ioman salajrmalaltigon al ĉiuj, kiuj ricevas pli ol 100 rupiojn monate, dumtempa maldungo, laŭvica deviga ferio por ĉiuj dungitoj ktp. Tial ĝi decidis ne partopreni la laborojn de la de l'registaro starigita esplorkomisiono, ankaŭ pro la nesufiĉaj kondiĉoj, en kiuj tiu komisiono laboras k ĝia nesufiĉa konsidero al la plej gravaj aferoj de l'laboristoj.

Laŭ ITF-gazetservo n-o 9.

Korekto. — Bonvolu legi en la n-o 366/67, p. 16, unua kolono, 8-a linio de malsupre „kompare al" anstataŭ „flanke de" (la Misisipi).

V. I. Lenin pri la „seksa problemo"[1]

„Kiel multiuj raportis al mi . . ., ankaŭ la seksa problemo estas ŝatata temo en viaj gejunularaj organizoj. . . Ĝuste en la junulara movado ĉi tiu sensencaĵo estas treege malutila, treege danĝera. Tre facile ĝi povas kaŭzi ĉe kelkiuj troigadon k troekzaltadon de l'seksa vivo, detruon de junula sano k forto. . . Ĉie niaj K-dinoj kunlaboru sisteme kun la junularo. Tio estas daŭrigado, plivastigado k plialtigo de l' patrinemo, el la individua sfero al la socia. Kaj ĉiu vekiĝanta socia vivo k agado de l'virinoj estu akcelata, por ke ili forlasu la malvaston de sia individua, filistra inklino al hejmo k familio. . .

La ŝanĝita vidpunkto de l'junularo, rilate al la problemoj de l'seksa vivo, nature estas ‚principa' k apogas sin sur teorio. Kelkiuj nomas sian vidpunkton ‚revolucia' k ‚komunista'. Ili sincere kredas, ke ĝi estas tia. Min, maljunulon, tio ne imponas. Kvankam mi tute ne estas malgaja asketo, ŝajnas al mi, ke la tielnomata ‚nova seksa vivo' de l'junularo — kelkfoje ankaŭ tiu de l'maljunularo — tre ofte estas tute burĝa, estas nur plivastigo de l' burĝa bordelo. Ĉi-ĉio tute ne havas ion komunan kun libero de amo, kiel ni, komunistoj, komprenas ĝin. Certe vi konas la faman teorion, laŭ kiu, en la komunista socio, satigo de l'seksa pasio, de l'amoremo, estas tiel simpla k bagatela kiel ‚trinkado de glaso da akvo'. Ĉi tiu ‚teorio pri la glaso da akvo' frenezigis parton de nia junularo, tute frenezigis ĝin. Ĝi jam ruinigis multajn junulojn k junulinojn. Ĝiaj defendantoj asertas, ke ĝi estas marksista. Mi mokas pri tia marksismo, kiu senpere k rekte derivas el la ekonomia bazo de la socio ĉiujn fenomenojn k transformiĝojn en ĝia ideologia sur-strukturo. Tiel simplaj la faktoj tute ne estas. Tion konstatis jam antaŭ longe iu *Frederiko Engels* rilate al historia materialismo.

Laŭ mia opinio, la fama teorio pri la glaso da akvo estas tute nemarksista k krome nesocia. En seksa vivo efikas ne nur la faktoj de l'naturo, sed ankaŭ la akiraĵoj de l'kulturo, ĉu ili estu altnivelaj, aŭ malaltnivelaj. En sia libro ‚Origino de l'familio' *Engels* montris, kiel atentinda estas tio, ke la ĝenerala seksa instinkto evoluis k sublimiĝis al individua seksa amo. La interrilatoj de l'seksoj ja ne estas nura esprimo de la reciproka agado inter socia ekonomio k fizika bezono, agado, laŭpense izolata per fiziologa konsidero. Estus racionalismo, sed ne marksismo, se oni volus dedukti izolite k deŝirite el ĝia interligiteco kun la tuta ideologio, la transformiĝon de tiuj rilatoj senpere el la ekonomia bazo de la socio. Nu, certe! Soifo volas esti satigata. Tamen, ĉu, en normalaj kondiĉoj, normala homo sin metos en la koton k trinkos el marĉeto? Aŭ eĉ nur el glaso, kies rando estas graseca pro multaj lipoj? Sed pli grava ol ĉio alia estas la socia flanko. Trinki akvon, tio vere estas individua afero. Sed por la amo necesas du, k tria, nova vivaĵo, povas estiĝi. Tiu fakto enhavas socian intereson, devon al la socianaro.

Kiel komunisto mi ne havas eĉ la plej malgrandan simpation por la ‚teorio pri la glaso da akvo', eĉ ne, se ĝi portas la belan etiketon: ‚Liberigo de l'amo'. Krome, ĉi tiu liberigo de l'amo estas nek nova, nek komunista. Vi certe memoras, ke ĝi, ĉefe dum la mezo de l'pasinta jarcento, estis predikata en la beletristiko kiel ‚emancipado de l'karno'. La tiama prediko estis pli lerta ol la hodiaŭa; ĉu estas same pri la praktiko, tion mi ne povas juĝi. Per mia kritiko, mi ne volas pledi por asketismo. Tion mi tute ne intencas. La komunismo ne donu asketismon, sed viv-ĝojon, viv-forton, ankaŭ per kontentigita am-bezono. Sed, laŭ mia opinio, la nun ja ofte videbla troigo de l'seksaĵoj ne donas viv-ĝojon k viv-forton, ĝi nur forprenas ilin.

Ĝuste la junularo bezonas viv-ĝojon, viv-forton. Saniga sporto, gimnastiko, naĝado, migrado, ĉiaj korpaj ekzercoj, multamplekso de l'spiritaj interesoj. Lerni, studi, esplori, plejeble komune! Ĉi-ĉio donas al la gejunularo pli multe ol la ĉiamaj paroladoj k diskutoj pri seksaj problemoj k la tielnomata plenĝuado de l'vivo. Sana korpo, sana menso! Nek monaĥo, nek amindumanto, sed ankaŭ ne germana filistro, kiel mezaĵo. Vi konas ja la junan K-don A. . . Bonega homo, genia. Tamen mi timas, ke li neniam atingos ion rimarkindan. Li vagas k flirtas de amafero al am-afero. Tio ne taŭgas por politika batalo, nek por revolucio. En luktado mi ne fidas al la akurato k persistemo de tiuj virinoj, ĉe kiuj la persona romano sin miksas kun la politiko. Ankaŭ ne al tiuj de viroj, kiuj postkuras ĉiun jupon k lasas sin ensorĉi de ĉiu juna ino. Ne, ne, tio ne estas akordebla kun la revolucio."

Laŭ Esperanta „ISK", n-o 11, jul./sept. 1931.

[1] Eldiroj el parolado inter Klara Cetkin (Zetkin) k Lenin, represitaj en „Memoroj pri Lenin" de Kl. Cetkin (Vieno-Berlino 1929).

DIABLIDOJ

Aventura rakonto pri k por geknaboj. Prolet-tendenca. Originale verkita de *N. Barthelmes*. Kun bela titolbildo.

48 paĝoj. Form. 13×18. Prezo: 0.60 mk.g.

Administrejo de SAT
Leipzig O 27, Kolmstr 1.

MI VOLAS SCII...

Respondo al K-do Teamiko.

Mi ne estas brazilano, sed argentinano k tial ke ĉe ni oni konsumas multe da *mate*-o, mi povas doni al vi la deziratan sciigon. Nialandanoj konsideras la mate-on ne kiel nutraĵon, do ĝi ne nutras, sed kiel simplan tempopasigilon. Ĉe ni oni kutime trinkas la mate-on jene: oni metas ĝin en malgrandetan kukurbon kun bolanta akvo; oni trinkas ĝin elsuĉante la akvon per metaltubeto. Tiel oni en nia lando ĉiutage, eĉ ĉiuhore trinkas mate-on. Sed neniu konsideras la mate-on kiel nutraĵon, malgraŭ ke oni grandajn kvantojn da ĝi konsumas. Laŭ mia sperto mate-o estas netaŭga nutraĵo; kia ajn trinkebla preparaĵo el kreskaĵoj, ekz. hordeo, aveno k.a., estas supera. La brazila propagando por mate-o estas klarigebla per la fakto, ke la ĉi-landa registaro malpermesis la enkondukon de grandaj kvantoj da mate-o, k kompreneble la brazilaj kapitalistoj devas serĉi novan merkaton por ĝin vendi.

14808 (Argentino).

DISKUTEJO:

Ĉu la Gek-doj ŝatas maldecaĵojn?

Ni ricevis pri ĉi tiu temo ankoraŭ ĉi-subajn du skribaĵojn, kiujn ni represas nur en resumita formo, por ne foruzi tro da spaco per tiu jam sufiĉe longe pridiskutita afero. Ni fermas pri ĝi la debaton. *Red.*

K-dino 509, mi ne diros, ke vi estas burĝe pensanta. Mi ne estas proleto denaskiĝa, al kiu mankas peco da pano. Mi estas sufiĉe bonvivanta terkulturisto, kiu havas pli da pano ol necesas. Mi estas proletema, ĉar min hontigas vidi, kiel unu homo eluzas la laboron de multaj nur sole por sia persona bono. Ni devas esti interhelpemaj.

Nia organizo estas tiu de l'proletoj. Sed la vorto „pruda" naskiĝis ne en proletaj, sed en burĝaj rondoj. Ni, iom pli alte starantaj proletoj, ne devas forgesi, ke nia laboro k vivo estas ligitaj ankaŭ kun la plej abomena k *maldeca* sorto de tielnomataj „forĵetaĵoj" el la homa socio; ni ne povas de ili deflankiĝi, se ni havas homan koron. M. Gorki, la granda rusa k same tutmonda proleta verkisto, priskribas la plej mizeran homan vivon. Sed kiam mi legis lian „Infanaĝo"-n, mi havis senton, ke li eltiras iun estaĵon el la koto k montras, ke ĝi tamen estas ... homo, kiel vi k mi. En tio kuŝas, laŭ mia gusto, la plej abomena maldecaĵo, kiam burĝaj ĵurnalistoj k verkistoj insultis Gorki per ĉiaspecaj fivortoj, ĉar li konsentis redakti antaŭparolon favoran al la Plena Verkaro de Dzerĵinski. Ni abomenu, kio estas vere abomeninda: kiam homo forgesas sian dignon, vendas por mono sian konvinkon, kiam la proleto, iom pliriĉiĝinta, forgesas pri la „malgrandaj fratoj" k fariĝas korta aŭ eĉ ĉambra hundo en burĝa domo. Sed bagatelajn maldecaĵojn ni ne tuŝu. La valoron de la de vi kritikitaj pecoj k. s. mi taksas neniom pli malalte ol la aliajn, kiujn enhavas la gazeto. Ilia avantaĝo antaŭ pure sciencaj verkoj pri sama afero estas tiu, ke ili surhavas personan stampon, do ne nur instruas, sed helpas al unu homo kompreni la alian. Cetere tiaj artikoloj certe ne superplenigos la gazeton.

Meikulo Bevers (17 254), Latvio.

Mi opinias, ke oni devus anstataŭigi la vorton „maldecaĵoj" per „malĉastaĵoj". En multaj punktoj tiu afero ne estas nur „ĉefe afero de gusto". Multajn „maldecaĵojn" oni opinias decaj, belaj: freŝa naturo aŭ virino, viro sendube estas belaj — tiom pli kiam ĉiuj estas naturaj. Vesto estas portata por beligi, aliaspektigi la korpon, ĝian formon ktp. Ne plisimpligitan arton, belon ni bezonas; uniformo, egalo por individuoj estas netolerebla. Ju pli multe da varioj, koloroj, des pli intensa, multflanka estas la vivo mem. La starigo de l'demando „Ĉu la Gek-doj ŝatas ..." estas sufiĉe subjektiva k persona. Mi plene subtenas socion el „nuduloj", nudkulturon en kamparo, montaro, arbaro ktp. Sed en urboj tio estus netolerebla, k kiam tiaj adeptoj foje montriĝis ĉe ni nude en la stratoj, en la tramo ktp., la afero finiĝis per konduko ilia al milicejo.

Sovetiano.

POR NIA MEDITO.

Iluzioj.

El ĉiuj civilizigaj faktoroj, la iluzioj estas eble la plej potencaj. Ĝi estas iluzio, kiu konstruigis la piramidojn k dum kvin mil jaroj starigis en Egiptio gigantojn el ŝtono. Ĝi estas iluzio, kiu dum la mezepoko konstruigis la grandegajn katedralojn k instigis Okcidenton invadi Orienton por konkeri tombon. Ĝi estas per alcelado al iluzioj, ke fondiĝis religioj, kiuj submetis la duonon de la homaro sub siajn leĝojn k ke stariĝis k detruiĝis vastaj imperioj. Ĝi ne estas per celado al la vero, sed al la eraro, ke la homaro elspezis pli da energio. La ĥimeraj celoj, kiujn ĝi alceladis, estis neatingeblaj; sed estas per ilia alcelado, ke estis realigataj ĉiuj progresoj, kiujn ĝi ne serĉis.

Gustavo Lebon El: *Psikologiaj leĝoj pri la evoluado de l'popoloj.* Elfrancigis *Ajnulo.*

Stenografio k laboristaro.

Ju pli multe la laboristaro sin liberigas k entreprenas en ĉiu sfero de la homa kulturo, des pli forte ĝi sentas la bezonon havi pli konvenan k pli rapidan ilon ol la antikva longskribo por skribaj laboroj, speciale por skribaj interkomunikoj. Ĉiu tre malagrable sentas la perturban malrapidon de la ordinara longskribo ege malhelpanta, eĉ detruanta produktivan mensan laboradon de la cerbo. Simplaj homoj, precipe laboristoj devas kontribui al la longskribo multegon el sia valora forto mensa k korpa, kiu do estas perdita k mankas al la vere celita laboro por la progresigo de l'ekonomia k kultura vivo. Ne mirinde, ke ĉiu ajn homo sentas fortan malamon kontraŭ la peniga laboro de la skribado k evitas ĝin kiel plej eble. Sendube ĉi tio estas unu el la plej gravaj kaŭzoj por la ankoraŭ tre modestaj skribaj rilatoj inter la laboristaro, ankaŭ inter esperantistoj diversnaciaj. Kaj pro tio suferas ankaŭ la mensa aktiveco, malrapidiĝas la sinliberiga batalo de la laboristaro.

Riĉaj k potencaj homoj sin helpas aliel... Ili havigas al si skribistojn, lertajn stenografistojn k krome disponas pri multaj aliaj helpiloj (diktafonaparatoj ktp.). Do, la potenculoj bezonas nur pensi k ... dikti. La longskribo postulas de ili apenaŭ iun oferon de ilia korpa k mensa forto, sed nur almozon el ilia monujo por la skribistoj. Tial ili ankaŭ ne povas senti la neceson de simpla, facila k rapida skribo, taŭga ne nur por profesiaj skribistoj, sed por ĉiuj homoj! Simila estas la afero en la lingva sfero.

Amikoj de kultura progreso provis jam antaŭ jardekoj propagandi la stenografion inter la laboristaro; sed ili malsukcesis. Alproprigis al si la stenografion nur la profesiaj rapidskribistoj k relative malgranda parto de profesiaj multskribuloj, kies plej granda parto ankaŭ preferas dikti al skribistoj. La kaŭzo por ĉi tiu malsukceso de la malmodernaj stenosistemoj estas facile trovebla. Ĝi estas la kompliko, malklaro k malfacilo de la stenosistemoj. En „Tutmonda Intersteno" ĉi tiu temo estis pritraktata jam de la plej diversaj flankoj. Ĉi tie sufiĉas montri nur unu rilaton: Kiaj la cirkonstancoj estas en la sfero de internacia lingvo, tiaj ili estas ankaŭ en la sfero de la skribo. Por la laboristaro taŭgas nur internacia lingvo, kiu estas unue simpla k facila k samtempe taŭga por la plej altaj taskoj de kulturlingvo: klare esprimi la plej delikatajn nuancojn de sentoj k pensoj. Sammaniere al la laboristaro povas utili nur stenoskribo, kiu estas ne nur sufiĉe mallonga k rapide skribebla por fari rapidajn notojn okaze de paroladoj k diskutoj aŭ por rapide fiksi pensojn, sed kiu estas ankaŭ tiom simpla k klara, ke ankaŭ malmulte skriblertaj homoj povas uzi ĝin pli facile al la ĝisnunan elongskribon, por ĉiuj

skriblaboroj, precipe por la korespondado. Kaj simile kiel en la lingva sfero jam ekzistas la bezonata lingvo — *esperanto* — tiel ankaŭ nun ekzistas skribo, kiu posedas la ĵus diritajn k postulendajn ecojn, nome *Intersteno.*

Restas montri ankoraŭ kelkajn aliajn preferojn de ĉi tiu skribo, de kiuj dependas ĝiaj nesupereblaj ecoj. La ĝisnunaj steno-sistemoj devenas de la antikvaj longskriboj; multaj steno-sistemoj eĉ transprenis ortografiajn sensencaĵojn k krome kreis novajn. Intersteno estas en ĉi tiu rilato tute alia, vere revolucia: ĝi tute rompis k forĵetis la katenojn de la kutimo, kiu kun sia plej intima parenco, la inerto de la homoj, estas la plej grava malamiko por ĉiu progreso. Intersteno devenas kvazaŭ senpere de la viva parolata lingvo mem; ĝi estas la sola skribo, kies elementoj estas formitaj k ordigitaj tute laŭ la naturo de la elementoj de la lingvoj: la sonoj. Pro tio ĝi estas facile uzebla por ĉiuj lingvoj. Fine ĝi estas en plej mirinda maniero plimallongigebla k tiel ankaŭ taŭgas por la plej alta rapidskribista praktiko. Intersteno do estas vere universala skribo.

Eble oni demandas, kial tia skribo ne jam estas pli bone konata k disvastigata? Nu, unue oni devas atenti, ke ĝi estas publikigita kiel internacia stenoskribo nur antaŭ kelkaj jaroj. La ceteraj kaŭzoj estas la samaj, kiujn oni devas citi klarigante, kial esperanto ne jam estas la dua lingvo de ĉiu kulturcela laboristo, ankaŭ ne en U.S.S.R.! Sed same kiel esperanto estas necesa por la progresigo de nova kulturo, tiel ankaŭ nova universala skribo, nome Intersteno, estas minimume samgrade necesa, ĉar ĝi helpas al pli vigla interŝanĝo de ideoj, al pli vigla mensa aktiveco por rompi la katenojn de letargia k inerta kutimiĝo, kiu estas la plej granda malamiko de la laboristaro.

F. G.

EL MIA VIVO

Mi estas 28-jara fraŭlo-laboristo. Mi naskiĝis k loĝis ĝis la jaro 1921 en la urbo Novorosijsk en Sovetio. Miaj gepatroj estis malriĉaj homoj. La patro mortis, k mi restis sep jarojn en tre mizera stato kun panjo k junaj fratoj. Depost mia 10-a jaro mi jam laboris en diversaj laborejoj, en tre malbonaj kondiĉoj. Post la revolucio mi aliĝis al la lab.profesia sindikato k diversaj organizoj. En tiu ĉi medio mi ekkomprenis mian malbonan sorton k eksciis pri la batalo de l'laboristaro k la maniero kiel batali por plibonigi nian sorton. Sed en 1921 panjo forveturis kun mi k miaj fratoj al Litovio — kapitalista lando.

Alveninte tien mi tuj aliĝis al mia profesia sindikato k „Socialista Junulara Asocio" en la urbo Radviliŝkis. Tie mi multe laboris por la laborista movado, tiel ke oni min baldaŭ elektis kiel estron de kelkaj asocioj. En 1926 mi estis elektita de laboristaj organizoj por veturi en Sovetion kun la celo post reveno komuniki al la litovia laboristaro pri la laborista vivo en Sovetio, ktp. Sed veturi mi ne povis, ĉar en nia lando tiam okazis dekstrula revolucio. Oni min k kelkajn amikojn tuj arestis. Kaj oni veturigis min al la urbo Ŝiaŭli k lokis en la malliberejon por pezaj laboroj.

En la malliberejo mi eksciis pri esperanto k tuj komencis lerni nian karan lingvon. Post forpaso de kelkaj monatoj oni liberigis min (en printempo 1927) k mi komencis denove labori en libero. Mi aliĝis esperantan societon, ĉar laboristaj asocioj estis malpermesitaj; post kelkaj monatoj mi jam estis elektita kiel estro en tiu societo, sed ne por longe.

En septembro 1927 okazis en Taŭrogen maldekstrula ribelo; tiuokaze mi ree estis arestata k veturigata al Ŝiaŭli, sed post esplortraserĉo oni min liberigis. Ĝuinte iom da tempo en libero, mi estis denove arestata en 1928 pro la akuzo de malbona homo el nia esp. societo, kiu denuncis min ĉe la politika (sekreta) polico, ke mi estas ano de l'litova kompartio, havas tiurilatajn gazetojn, ke mi salutis je la nomo de nia societo sovetiajn Gek-dojn okaze de la 11-a datreveno de l'Oktobra revolucio ktp. Tuj okazis rearesto. Ĉe traserĉo la policistoj min forte batis k ŝiris la harojn, tiel ke mi dum kelkaj tagoj ne povis moviĝi k la tuta korpo doloris. Oni min veturigis al la Ŝiaŭli-a malliberejo, kie mi pasigis kelkajn tagojn; poste mi estis forsendata al dua malliberejo en alia urbo — Kaŭnas.

Tie mi renkontis miajn amikojn k trovis multajn K-dojn. En la ĉambro, kie mi sidis, estis el la kulpigitoj 8 komunistoj, 11 socialdemokratoj, 2 social-revoluciuloj k 3 popol-naciistoj. En la tuta malliberejo tiutempe estis 270 politikaj arestitoj. 197 el la kulpigitoj estis komunistoj, inter ili 37 virinoj, 65 socialdemokratoj, la ceteraj estis social-revoluciuloj k popol-naciistoj. Post forpaso de tri monatoj la juĝesploristo liberigis min ĝis la juĝa tago, kontraŭ kaŭcio. Kaj tiam fine mi estis absolvita. Ankoraŭ kelkajn fojojn oni kaptis min k mi sidis en la arestejo, sed pri tio mi ne deziras skribi.

Stazis Riĉkus (12868).

LIBRO-MONATO DE SAT!

Gek-doj! Por havigi al ni kiel eble plej rapide sufiĉe grandan sumon da kontanta mono k tiel supervenki la momentan financan krizon en nia organizo, ni decidis,

dum la tuta monato novembro vendi niajn SAT-librojn kun granda rabato de 33 procento

je la ĝisnuna kataloga prezo. Tiu favorprezo je ĉiuj SAT-eldonaĵoj validas nur unu monaton, nome por la mendoj farataj en novembro! La K-doj profitu tiu bonan okazon k superŝutu en novembro nian Administracion per libromendoj!

DIREKCIO DE SAT.

KONTRAŬ LA DOGMOJN.

Katolikaj intrigoj en Hispanio.

En la esperantista dusemajna gazeto „Katolika Vivo" oni povis legi finaŭguste artikolon el Hispanio sub la titolo: „Kio okazas en Sankta-Lucia de Ezquioga?" Eĉ ilustro ornamis tiun artikolon, montranta tiun „sanktan lokon", kie du geknaboj (12- k 7-jara) laŭ la priskribo ekvidis aperaĵon de la „Sankta Virgulino" k konversaciis kun ĝi. Poste vidis ĝin ankaŭ kelkaj aliaj personoj (kies biografieton k foton reproduktas „Katolika Vivo"). Laŭŝajne ĉiuj tiuj personoj estas simplaj proletoj aŭ proletidoj. Unu kazo precipe altiris mian atenton, ĉar temas pri plenaĝa laboristo: 28-jara aŭtokondukisto (en la servo de privatulo), kiu laŭdire „svenfalis, ĉar li vidis la aperon de la Sankta Virgulino. Tiel fortan sensacion li sentis, ke li ne povis konduki la aŭtomobilon al Legorreta." Ĉu estas simple koruptita tiu plenaĝa persono k sekve ŝajnigis sian „svenfalon" ktp., aŭ ĉu li agis sub influo de malsana spiritostato, kaŭzita de katolika eduksistemo? Ĉi lastan ni povas senrezerve supozi por la diversaj infanoj cititaj, kiuj kredeble rekte estas sugestitaj de siaj pastraj edukantoj k agis sub hipnotado. Ni ne povas respondi ĉi tie, kiu el tiuj hipotezoj estas la ĝusta, k tio cetere ne gravas. Kio pli gravas, tio estas la sekvo de tiu okazaĵo, pri kiu ni legas i.a.: „La trian tagon (post tiu apero), ĵaŭdon ... el ĉiuj domaroj k vilaĝoj alvenis centoj da personoj, ĉar jam disfamiĝis la novaĵo, k same okazis la vendredon. Kvinan tagon ... iom pli 1500 personoj atendis la infaninon ..., portanta flaman kandelon en unu mano k bukedon en la alia, akompanita de kelkaj pastroj, kiuj, suprenirante la deklivon de la kampo, demandis: — Ĉu vi vidas ion? — Kaj la infanino respondis jese..."

„Dimanĉon, 5. julio, ĉeestis proksimume tri mil personoj, la civilgardistoj ... ordigas la transiĝon en la monteto k valo... Mardon, 7. julio, la ĉeestantaro estis pli ol ses mil personoj, multegaj aŭtomobiloj, aŭtoĉaroj, bicikl-

oj, kaleŝoj k ceteraj baris la vojojn al piedirantoj. La eminenta d-ro Asuero atente ekzamenis la knabinon k deklaris, ke ŝi estas sana k normala... Merkredon, 8. julio ... ĉeestis proksimume dekdu mil personoj; la aŭtomobiloj estis ducent dek ..." ktp.

Kion signifas tiu spektaklo? Ĝi estas lerte enscenigita de la pastraro, kiu defendas sian reĝimon kontraŭ la respublika laikismo, kiu lasta minacas per pereo ĝian potencon. Tiu ruze aranĝita scenaĵo estas nenio ol politika manovro – por konservi al si la simplanimajn popolamasojn. El la fino de l' artikolo, en kiu estas parolite pri „eklezia proceso, kiun baldaŭ komencos la aŭtoritatuloj" pri ĉi tiu afero, oni povas klare ekkoni, ke tiu komedio devas servi al la katolikismo por vasta propagando, kiun ĝi en nuna momento treege bezonas, ĉar ŝanceliĝas la malnovaj kredoj ankaŭ en ĉi tiu katolika lando. Ni esperu, ke la nova reĝimo permesos al la liberpensuloj fari ĉion, kio estas en ilia povo, por alporti lumon al la amasoj k klarigi al ili, kion signifas tiu nova „miraklo". *B.*

Preĝado ĉe la militistaro.

El la nova preĝaro por anglaj soldatoj mi citas jenan preĝon: „Ho Sinjoro Dio, pro tio ke nenio estas tro malfacila al vi, por pligrandigi la fidon, ni petas, je la parto de la Lankaŝiraj fuzilieroj, ke ni povu ornami nin per kuraĝo kiel per floro en la batalago. Kaj aŭdante la voĉon de tiu, kiu estas dirinta: „Ĉio estas ebla al tiu, kiu kredas", ni povos toleri ion ajn pro la amo de vi, la sama Jesuo Kristo, nia Sinjoro."

La absurdo pli-elmontriĝus ankoraŭ, se oni havus internacian kolekton da tiaj soldatpreĝoj. Do, K-doj, mi petas vin sendi al mi ekzemplon el via lando. *Alb. Dean,*
6 Heath Str., Lower Broughton M-C., Anglio.

Atentigo!
K-doj, kiuj deziras vidi en la Jarlibro antaŭ sia nomo signon pri partianeco, devas sciigi tion al la Administracio antaŭ la 15. decembro.

TRA ESPERANTIO

Akcesoraĵo.

Kiu studis iomete la historion pri la mondlingva movado ĝenerale k aparte pri esperanto, tiu bone scias, kiom da „sciencaj" argumentoj estis eldirataj de gravaj, aŭtoritataj fakuloj por pruvi, ke artefarita lingvo estas neeblaĵo, sensencaĵo. Por multaj diplomitaj lingvistoj la provo starigi artefaritan lingvon similas la agon de d-ro Faŭsto, provanta krei vivan estaĵon en sia retorto.

La nombro de tiaj scienculoj pli k pli malpligrandiĝas; sed ekzistas ankoraŭ kelkaj, kiuj obstine fermas la okulojn por ne vidi la faktojn, por ne konstati, ke la ĉiuaga uzado de esperanto refutas la belfrazajn, teoriajn argumentojn.

Cetere similan rimarkon oni povas fari sur aliaj kampoj de la teorio k praktiko. Eminentaj personoj ja asertis, ke fervojoj neniam havos estonton, ke estas tute utopia la celado organizi transportadon per tia rimedo. Aliaj ne malpli eminentaj sciencistoj pruvis per A+B, ke flugmaŝinoj pli pezaj ol la aero neniam sukcesos funkcii.

Tamen tiaj „sciencaj" pruvoj ne sukcesis malkuraĝigi la elpensemulojn, kiuj estis instigataj de ia nekontraŭstarebla intuicio k gvidataj de empiria metodo.

Malgraŭ la teoriaj pruvoj de aŭtoritataj fakuloj la tuta terglobo kovriĝis per fervoja retaro, la ĉielo pleniĝas pli k pli per helicaj zumadoj k sonas esperanto en kongresoj, en kunvenoj, en hejmoj inter geedzoj k eĉ infanoj. Tiaj estas la faktoj k ili argumentas pli forte ol la plej subtilaj teoriaĵoj de fakuloj.

Kaj ni ne forgesu, ke la aŭtoro de esperanto ne estis lingvisto, sed simpla okulisto. Kia ironio! ...

*

Sendube la ĉi supre aluditaj fakuloj ridindigis sin; sed ne malpli ridindaj ŝajnas al mi tiuj esperantistoj, kiuj nuntempe abunde liveras teoriajn argumentojn por pravigi ... la ekziston k funkciadon de esperanto. La argumentado de tiuj novspecaj teoriuloj plej ofte kaŭzas nekontraŭstareblan oscedon ĉe la leganto, sed almenaŭ ĝi estas rimedo por kovri banalaĵojn per sciencoaspekta volvaĵo. Kaj la efiko de tio ĉe kelkaj naivaj legantoj estas, ke ili des pli opinias la traktaĵon serioza k valora, ju malpli ili komprenas ĝin. Kaj ties aŭtoroj tiel akiras reputacion de lingvista kompetento...

Fakte la tuta afero estas ridinda por pripensemaj homoj. Simpluloj ja uzas ĉiutage esperanton k sekve ne bezonas cerbumadi por scii, ĉu tia uzado estas konforma aŭ ne al lingvistikaj postuloj. Uzantoj plie ekridegas, ĉe la konstato, ke en la verkoj de teoriuloj troviĝas kelkloke plej elementaj gramatikaj eraroj; tiam praktikuloj emus instrui al pretendemaj aŭtoroj, ke iliaj verkoj indas esti metataj flanken k estonte lasos ilin flanke.

Jes ja, ia homoj, kiujn gvidas nur la simpla saĝo, kritikeme rilatas al ŝajnsciencaj verkoj, kiuj sonas malplene ĉe frapo de laborula mano. *Aristarko.*

Socialistaj esperantistoj atentu!

Ĵus leginte en germana gazeto sciigon, kiun mi traduke reskribas, mi turnas min al vi, k precipe al la anoj de partioj apartenantaj al la Amsterdama Internacio, ke vi sendu protestojn por pruvi la utilon k disvastiĝon de esp-o.

Jen la traduko. *Reform-anglan lingvon* kiel mondlingvon intencas enkonduki en Berlin fondita Anglio-Klubo, a! kiu inter aliaj apartenas Ajnŝtajn (Einstein), Lebe (Löbe) k la eksĉefministro Marks (Marx), ĉar provoj pri artefaritaj mondlingvoj ĝis nun montriĝis sensukcesaj. La planita reformo de la angla lingvo plejparte rilatas al la ortografio...

Do, neniu alia, ol la eminenta gvidanto de l'socialdemokrata partio, la prezidanto de la regna parlamento en Germanio, havas la tempon dum tiuj krizaj tagoj de la partio mem k de la tuta popolo, sin okupi pri tiaj sensencaĵoj. Gek-doj ĉiulandaj, ni protestu kontraŭ tio pere de la socialista frakcio. Sendu multajn protestskribojn al K-dino E. F. Klatil, Hectorstrato 4. I, *Amsterdam-Z.* Tio estas tasko tre grava por nia frakcio. *11309.*

Ni ricevis jenan tekston kun insista peto pri publikigo:

„La Centra Estraro de Laborista Esp. Asocio „Laboro" en Pollando protestas plej energie kontraŭ la neallaso de reprezentanto de ukraina popolo al la salutparolado dum la malfermo de l' 23-a Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo dum aŭgusto 1931."

Ne forbiciklu eksterlanden senprepare!

Mi volas averti K-dojn intencontajn bicikli eksterlanden okaze de strangaj spertoj dum mia biciklado por atingi Turkion. Surprizita mi estis, ke ĉe la german-aŭstra limo estis postulata t.n. garantisumo de 60 mk. germ. pro la enkonduko de biciklo. Kiel senlaborulo mi ne posedis tiun sumon, sed fine sukcesis konvinki la aŭstran doganiston, ke mi neniaokaze vendos mian „feran ĉevalon", nepre bezonante ĝin por la pluvojaĝo. Kvankam tiu doganisto respondis al mi, ke ĉe la jugoslava limo oni ne postulus deponon de monsumo, oni ĉe la tiea limo postulis eĉ pli altan garantisumon, k klarigis, ke la samo okazus al mi ĉe la bulgara limo. Mi tro malfrue eksciis, ke se mi estus ano de la germana lab. bicikla unuiĝo „Solidaro", mi povus enveturi ĉiujn landojn

sen malhelpoj. Direktinte mian biciklon hejmen, mi havis sufiĉe da okazo por pripensi, kiel bone estas baraŭtaj la unuopaj landoj kontraŭ „invado“ de malriĉuloj. Mi esperas, ke miaj linioj helpos aliajn K-dojn sin pli zorge prepari al biciklado ol faris mi; tiel ili evitos similan fiaskon. *15026, Bottrop.*

EN NIA MOVADO

KRONIKO

Britio: La grupo en Nelson kondukis kurson sub la aŭspicioj de la Nacia Konsilantaro de Lab.Kolegioj kun 40 p. laŭ „Petro“. Precipe vigle laboras K-do Bland por fortigi la grupon, en kiu estas 5–6 SAT-anoj. – **Germanio:** Okaze de la Regna Junulara Tago socialista en Frankfurt la Frankfurta SEA-grupo aranĝis kunvenon por la junaj gemembroj bone vizititan, en kiu K-do Mack salutparolis k K-do Puff parolis pri la signifo de esp-o por la junularo. Oni elektis komitaton, kiu havas la taskon kunigi ĉiujn esp-istojn en la soc.junularo por komuna agado. (Laŭ „La Socialisto“.) *Boĥum.* La SAT-Rondo Boĥum aranĝis inter la senlaboruloj de la liberaj sindikatoj kurson kun 26 p. Gvidas Zernikov. La kurso okazas en la sindikata domo. Nova kurso en preparo por mezo de okt. – **Nederlando:** Fondiĝis la 53-a sekcio de Ned.LEA en Zutfen kun deko da K-doj. Okazis bonsukcesaj ekspozicioj, la div. sekcioj jam enskribis kelkajn centojn da kursanoj. La varb-agado ankoraŭ daŭras. Ĉe VARA (stacio Hilversum) okazos radio-kurso. La eldonkvanto de la LEA-gazeto „Laborista Esp-isto“ estas nun 3000 ĉiu-14-tage. – **Portugalio:** *Lisbono.* Radiostacio CTIGK disaŭdigis portugalan paroladon pri evoluo de esp-o de K-do J. Vicente Jor. (11863). Ankaŭ tiu K-do raportis en esp-o pri la portugala esp. movado. Esp-o nun altiras la atenton de l'junularo, k la gazetaro ofte raportas pri nia movado. En Ligo de la Okcidentaj Esp-istoj sukcese funkcias 3 kursoj k en Lab.Societo „Nova Vojo“ kurso estos malfermata. Ankaŭ esp.ekspozicio estos aranĝata k en *Setubalo* fondiĝis grupo. Ĵus okazis monata kunveno de l'loka SAT-Rondo, en kiu post bruega diskuto la plimulto decidis fidi al la SAT-direkcio. La ĝisnuna peranto eksiĝis. *(11863.)*

NIA POŜTO

13821. – „Isto“ povas eniri libere en Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio, Hispanio, Nederlando, Svisio, Svedio, Usono ktp. Ĉu tiuj landoj ne estas kapitalistaj? Bedaŭrinde, jes. Sekve, kion valoras via rimarkigo? Absolute nenion. Via blindo estas sendube kompleta. Mi esperas tamen, ke ĝi estas kuracebla; sed kredeble la kuraciĝo estos langdaŭra. – E. L.

15975. – Ni estus akceptintaj vian artikolon, se ĝi ne jam aperus (en alia traduko) en la n-o 311 de „S-ulo“ (18. 9. 1930)! Sekve ni ne povas aperigi ĝin.

15461. – Estas gramatikaj malkorektaĵoj en viaj versoj k ankaŭ nebelaĵoj (rimo per sufiksoj) en la rimo, kiuj faras ĝin nepresebla malgraŭ la belsenca enhavo. Eble vi povos ĝin iam reprilabori! – *Red.*

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo“:

Volksstimme, Mannheim, 22.8., esp-o k olimpiado; *Libera Socialisto*, Rotterd., 9. 9., okazis miraklo (359), en esp-o k holanda lingvo. (Tiu gaz. entenas ĉiusemajne similan rubrikon esp.-k nacilingvan. Aliaj K-doj klopodu atingi la samon!)

Priesper. artik. k notojn enpresis:

Travail, Lyon, 26. 9.; *Solidarität*, Offenbach, 1. 10.; *Signalen*, Stokh., 24. 9.; *Le Breton Socialiste*, Morlaix, 19. 9.; *Fränk. Tagespost*, Fürth, 15., 22. 9.; *Münchener Post*, 9. 9., 18. 9., 1. 10.; *Le Populaire*, Paris, 21. 9.; *Volksblatt*, Boĥum, 22., 25., 28., 29. 9.; *Freie Presse*, Wanne-Eickel, 25., 28. 9.; *Herner Volkszeitg.*, 25., 28. 9.; *Wittener Volksztg.*, 25., 28. 9.; *Volksstimme*, Wattenscheid, 25. 9., 28. 9.

Peresper. materialon enpresis:

Le Réveil Ouvrier, Nancy, 26. 9.

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Volksfreund, Karlsruhe, 24. 8.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. – Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

La subskribanto petas al ĉiuj anarkiemaj Gek-doj, kiuj sentas la neceson havi interrilaton, skribi nomon, adreson k informojn.
Organiza Komitato de la anarkistoj en SAT. Komisie: *W. Wessels (12721)*, Vespuccistr. 97, III, *Amsterdam-W.* (Holando).

AŬSTRIO

– Laborista esp. grupo dez. individuan k kolektivan koresp-adon kĉl, L, PK, PI., krom Germanio. Resp. gar. Adr.: „Laborista Esperantista Grupo“, Keplerstr. 32, *Graz.*

Viena tramisto koresp. kun ekstereŭropaj Gekdoj. PI. Adr.: Leopold Haselsteiner, Quellenstr. 138/4, *Wien, 10.*

BULGARIO

K-do Toma Ajolov (horloĝisto), 11 August, n-o 6, *Plovdiv*, interŝ. PI, esp.gaz. kĉl.

K-do Georgi Stefanov, Oeruŝtica 47, *Plovdiv*, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PM. Certe resp.

ĈEĤOSLOVAKIO

Lab. societo esp-ista en Plzen „Peklo“ solenas de 24-a de okt. ĝis 1. novembro la 20-jaran jubileon de sia ekzisto. La 24-an de oktobro okazos je la 20-a horo en la kolona halo de lab. domo „Peklo“ esp. vespereto kun teatraĵo k alia programo. La 25-an okazos solena vespereto, ĝenerala kunveno k malfermo de esp. ekspozicio, kiu daŭros ĝis 1. XI. Ĉeesto da Gek-doj k salutleteroj estas kore bonvenaj.

La esperantistoj de la insulo TEXEL, Nederlando, anoj de la Teksel-a Esperanto Asocio, organizas letervesperon, la 9. dec. Sendu L, PK, PI, fotojn, gaz., presaĵojn ktp. al: K-do Joh. M. Duinker (SAT-ano 3691), Parkstraat 7, *DEN BURG* (Texel), Nederlando, kiu garantias respondon.

FRANCIO

Juna vegatarana hispana K-do dez. interŝ. seriozan korespond. kun juna K-dino, se eble muzikistino. *J. Cuadres*, 14, rue Provençal, *Cagnes s/Mer* (A. M.).

Mi dez. koresp. kun Gek-doj anglaj, germ., hisp., rusaj, nederl., aŭstraj. Adr.: Anne Ferdinando, *Brosville*, Eure.

GERMANIO

K-dino Joh. Hausse, Mittelweg 14, *Herischdorf/Rsgb.*, kĉl, L, PK, PI. Unufoja resp. nepre garantiata.

K-do Kurt Reichel, (lignaĵisto, 19 j., junsocialisto), Oppellstr. 22/III., *Dresden, N 6*, kĉl, pri politikaj k. a. temoj.

SAT-rondo dez. ricevi por festo de kursfiniĝo, la 8. 11. 31, L, PK, PI el ĉl. Adr.: K-dino Weile, Esperanto-hejmo, Neustädter Str. 8, *Magdeburg.*

K-do Fritz Glatte, Niederhof, *Lomnitz/Rsg.*, kĉl, pri div. temoj. Unufoja resp. garantiata.

K-do Kurt Fischer, Selenkestr. 7, *Breslau*, PM, kĉl.

K-do Theodor Dorn, nun loĝas: Dotzheimer Str. 60/I., *Wiesbaden.* Interŝ. L, PK, PI, PM. Resp. garantiata.

K-do A. Reul, *Würselen b. Aachen*, dez. adresojn de koresp-antoj, kuj interŝ. PI kun kursanoj por entuziasmigi ilin. Precipe por 2 infanoj 12- k 13-jaraj.

HISPANIO

Centre Cultural Recreatiu (Esp. Fako), Sto. V Balager na. 2, *Sabadell*, kĉl, pri ĉ. temoj.

8 lernantoj koresp. kun komencantoj, kĉl, PI. Adr.: „Centro Obrero Aragones“, Baja de S. Pedro 55, *Barcelona.*

NEDERLANDO

K-do J. M. Beshels, Moelweg 14, *Apeldoorn*, kĉl, pri ĉiu temo, L, PK, PI, PM, Resp. garantiata.

2 junuloj (17–18 j.), koresp. kĉl (ambaŭ metiistoj). Adr. M. v. d. Horst, Nwe Rubenstr. 80, 2 x b, *Rotterdam.*

SVEDIO

200 svedoj
gelaboristoj, ministoj, metiistoj, geoficistoj, fervojistoj, gelernantoj, k aliprofesiaj
finintaj komencan kurson de K-do N. Ruus en la ĉefurbo de
Laponio
dez. koresp. individue.
Adr.: Esp.Klubo K-do Bengtsson, 53–1b *Kiruna C.* Svedio.

ENHAVO

	paĝo
Al la tuta SAT-anaro	19–20
Lasthore	20–21
El Suda Afriko	21
El Japanio	21–22
Per SAT en Skandinavio	22–23
Pri la kvinjara plano	23–24
Oni preparas la spiritojn	24–25
Jubileo de komunista gvidanto	25
La klasbatalo tra la mondo	25–26
V.I.Lenin pri la ‚seksa problemo‘	26
Diskutejo	27
Stenografio k laboristaro	27–28
Kontraŭ la dogmojn	28–29

Abontarifo al Sennaciulo: **Argentino, pes. 6; Aŭstrio, ŝil. 12; Belgio, belgoj 12; Brazilio, milrejs. 18; Britio, ŝil. 9; Bulgario, lev. 250; Ĉeĥoslovakio, kr. 60; Danio, kr. 10; Estonio, kr. 8; Finlando, mk. 80; Francio, fr. 40; Germanio, mk. 9; Hungario peng. 10; Italio, lir. 45; Japanio, jen. 5; Jugoslavio, din. 120; Latvio, lat. 10; Litovio, lid 20; Nederlando, guld. 6; Norvegio, kr. 9; Polio, zlot. 15; Portugalio, esk. 40; Rumanio, lej 350; Sovetio, rubl 4,50; Svedio, kr. 9; Svisio, fr. 12; Usono dol. 2,50. — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.** Ni ankaŭ akceptas 1/4-jaran abonon. **MONON ONI SENDU:** rekte al la Administranto de SAT, **Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio),** poŝtĉek-konto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227848 — s'Gravenhage, 142084 — Praha, 501007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191335 — Wien-D, 137725 — Zagreb, 40040 — Kobenhavn, 14938 — Zürich-VIII, 15929. — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per **ŝtataj monbiletoj en registrita letero aŭ per poŝtmandato.**

Presejo: Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)